

# EL POPOLA ĈINIO

5

1973





Fosistoj de Kupra Erco


de Vu Junhua

# Intelektaj Gejunuloj en la Kamparo

Sub la stimulo de la alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, ke "estas tre necese, ke intelektaj gejunuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj". Ĉinaj intelektaj gejunuloj amase iris al la kamparo kun arda revolucia entuziasmo por kombini kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili modeste akceptas ilian reedukon kaj ludis aktivan rolon en konstruado de socialisma kamparo, sub la gvido kaj zorgo de lokaj partiaj organizoj.

Estinta ruĝarmeano konigas al la gejunuloj la tradicion de penema luktado en malfaciloj, por ke ili ĝin daŭrigu.





Sperta terkulturisto instruas teknikon al intelektaj gejunuloj.

Intelekta junulo lernas direkti traktoron.





Intelektaj junulinoj irintaj al la kamparo en la limregiono de Junnan estas varme akceptataj de nacimalplimultaj popolanoj pro siaj medicinaj helpoj donataj al ili.



Pekinaj intelektaj junuloj eklo-  
ĝintaj en kamparo de Ŝanhi-  
provinco fondis meteobserve-  
jon sin apogante sur propraj  
fortoj.

Sub zorgado de la Partio, i  
telektaj gejunuloj kreskas sa  
kaj vivas gaje post sia eklo  
en la kamparo.




Intelektaj gejunuloj ko-  
lektas kuracherbojn ku-  
ne kun malriĉkamarano  
en montaro.



Intelektaj gejunuloj transirintaj al kamparo kreas belartaĵojn post laboro.





Intelektaj gejunuloj laborantaj en arbaro de la Granda Hing-an-montaro de Hejlonggiang-provinco prenas manĝon.



# Plena sindediĉo al konstruado de nova kamparo

**E**N julio 1964, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ, Ĉeng Joŭĝi kiel abituriento iris kun arda koro kaj nobla volo de Ĝanggiakoŭ al Venkjuantun-brigado, Ĝuolu-gubernio, Hebej-provinco, por fikse loĝi tie. Kaj nun pasis jam ok jaroj. Retrorigardante sian travivaĵon, li asertis kun profunda spertiteco: En la kamparo troviĝas tiom da studindaĵoj, tiom da farindaj aferoj, ke eĉ tuta vivo ne sufiĉas. Niaj intelektaj gejunuloj povas multon fari en la vasta kamparo.

## LA UNUA LECIONO

Venkjuantun-brigado situas ĉe bordo de Sanggan-rivero. La tieaj naturaj kondiĉoj estas relative favoraj al agrikulturo. Etendiĝas fekundaj ebenaj kampoj, kaj la okulojn frapas vastaj fruktoĝardenoj. Kiam Ĉeng Joŭĝi venis al la brigado, la sekretario de la partia filio kondukis lin sur la bordon de la rivero kaj rakontis heroaĵojn de la Oka-voja Armeo kaj gerilanoj, kiuj batis siatempo la japanajn agresantojn kaj instigis lin heredi la gloran tradicion de la maljuna generacio kaj kontribui al la konstruado de nova socialisma kamparo. Aŭskultante la vortojn de la sekretario, fiksante sian rigardon al la orienten torentanta Sanggan-rivero, li decidis en sia koro: Tie ĉi, la gerilanoj militis kontraŭ malamikoj ne timante vivoferon, nun ni junuloj devas hardi nian revolucion volon kaj konstrui novan kamparon per niaj propraj manoj.

Ĉiam rigardante sin kiel humilan lernanton, juna Ĉeng atenteme lernas de la amasoj. Iun tagon, li partoprenis hortikulturan laboron de la 8-a produkta grupo. Li rimarkis ke la pirarboj estas altaj kaj ampleksaj dum la piroj estas malgrandaj kaj malmultaj. Kial?

Li turnis sin kun la demando al Avo Fan, kiu estis laboranta kune kun li:

“Kial niaj pirarboj, Avo Fan, donas malabunde fruktojn?”

“Hej! vi ne scias? Fariĝis jam ‘viraj’ niaj pirarboj. Ĉu ‘viraj’ arboj povas doni fruktojn!” humure respondis Avo Fan.

“Ĉu ankaŭ arboj dividiĝas en viran kaj inan seksojn?” demandis la junulo kun miro.


Post longa suspiro, Avo Fan diris:

“Aĥ! La historio estas longa. En la tempo de kooperativo kaj poste de la fondiĝo de komunumo, ni sekvis la socialisman vojon, ni bone flegis la arbojn kaj ili donis pli kaj pli multe da fruktoj. Sed ve, en la jaro 1960, kiam nia lando trafis naturajn katastrofojn kaj aperis al ni portempe malfaciloj, Liu Ŝaŭki antaŭenpuŝis reviziisman linion en la kamparo kaj devigis dividi la pirarbojn al ĉiu aparta familio. Kaj ĉe malstreciĝo de la flegado, la pirarboj fariĝis ‘viraj’ ”.

Post paŭzeto Avo Fan frapetis la ŝultron de juna Ĉeng kaj daŭrigis elkore:

“Mia knabo! La pirarboj formas duonon de la havaĵo de nia grupo. Vi estas klerigita junulo, klopodu ŝanĝi tion kun aliaj; vi devas fari kontribuon al la patrio!”

La vortoj de Avo Fan elmontris la firman decidon de la vastaj amasoj de komunumanoj por sekvi la socialisman vojon kaj elverŝis ilian malamon al la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. El tio Ĉeng Joŭĝi ricevis profundan edukon. Li decidis nepre ŝanĝi kune kun la komunumanoj la fizionomion de malalta produkto de piroj. Multajn pomolo-



*Čeng Joŭĝi esploras rizospikon.*

ĝiajn librojn li aĉetis kaj ĉiutage studis ilin ĝis profunda nokto. Li vizitadis ŝtatan fruktoĝardenon por konsulti ĝiajn teknikistojn kaj eksperimentis hejme ilian sperton kune kun la komunumanoj.

La humileco en lernado kaj diligenteco en esplorado de Čeng Joŭĝi estis laŭdataj de ĉiuj kaj la 8-a produkta grupo elektis lin kiel teknikiston por hortikulturo. Fine la pirarboj de tiu grupo alportis riĉan rikolton dank' al tio, ke ili intensigis la flegadon de la pirarboj, precipe ree fortranĉis la tro densajn kaj tro etenditajn branĉojn de la maljunaj arboj, plibonigante la kondiĉojn por aerumo kaj sunlumado. Tra la tuta brigado estis disvastigita ilia sperto, tiel ke la pirprodukto kreskis de pli ol 10,000 kg. abrupte al pli ol 100,000 kg. kaj nun ĝi jam superis 200,000 kg.

### SUKCESA KULTURADO DE PLANTIDOJ

La kampoj de Venkjuantun-brigado sur la riverborda etendaĵo tre taŭgas por planti rizon. Sed en la pasinteco, oni al kutimiĝis al primitiva kulturmaniero kaj plie la plantata specio degeneris,

tial la pomua produkto (15 muoj=1 hektaro) restis ĉiam ĉirkaŭ 100 kg. En 1966, kiam leviĝis la grandioza amasa movado de **"Iernado de Daĝaj en agrikulturo"**, la supera instanco alvokis reformi la malnovan kulturmanieron kaj disvastigi bonspaciajn semojn por konstante altigi la produktokvanton. La komunumanoj de Venkjuantun-brigado unuvoĉe elektis kamaradon Čeng Joŭĝi kiel agrokulturan teknikiston de la brigado. Por ne vanigi la esperon de la amasoj, li, unuflanke, ankoraŭ pli diligente lernis de veteranaj kamparanoj kaj, aliflanke, propagandis al la amasoj la sperton de aliaj lokoj pri apliko de novaj kulturmanieroj kaj bonspaciaj semoj por akiri pliprodukton. Krome li interŝanĝe ricevis pli ol 5,000 kg. da bonspaciaj rizsemoj el la gubernia stacio de bonspaciaj semoj por anstataŭi la malnovajn.

El la pliprodukta sperto de aliaj lokoj oni ekkonis, ke krom bonspacia semo necesas ankaŭ nova kulturmetodo. Sekve Čeng Joŭĝi kaj parto de komunumanoj eksperimente kulturis 0.2 muon da rizidoj. Kiam la rizidoj kreskis ĝis ekapero de la centra folio, oni rimarkis, ke plantidoj putriĝis. Por solvi tiun problemon, laŭ la komisiono de la partia filio kaj la komunumanoj, li piediris pli ol 50 km. por viziti dekojn da brigadoj tra la tuta gubernio. Ankaŭ en tiuj brigadoj aperis simila fenomeno, sed neniu el ili trovis kontraŭrimedon, ĉar ankaŭ ili unufoje kulturis rizidojn, havante nenian sperton. Malgraŭ tio Čeng Joŭĝi ne lasis fali siajn manojn. Reveninte al sia vilaĝo li kune kun aliaj dividis la eksperimentan kampon en 8 partojn kaj aplikis al ili ĉiu aparte plian sterkadon, akvumon, ŝprucigadon de insekticido kaj aliajn sume ok malsamajn rimedojn, por kompari la rezultojn. Post ripetada eksperimentado li trovis ke plej bonan rezulton ricevis plia sterkado. Tiu trovo komprenigis al li, ke la ĉefa kaŭzo de la putriĝo de rizidoj estas nesufiĉeco de nutro. Tiu sperto donis bonan ekzemplon al la tuta brigado por sukcesa kulturo de pli ol 40 muoj da rizidoj en pli posta tempo. En tiu jaro, sub zorga flegado de la komunumanoj pli ol 300 muoj de la brigado produktis po 360 kg. da rizo.

### AŬDACA PRAKTIKADO

Post la riĉa rikolto de piroj kaj rizo Čeng Joŭĝi pli profunde ekkonis la gravan signifon de scienca eksperimentado por disvolvi agrikulturan produktadon kaj decidis mem fari provadon por elhaki novan vojon al pliprodukto.

Vintre de 1967, sub la apogo de la partia filio de la brigado estis fondita selektejo de bonaj specioj. Kaj komenciĝis kulturado de bonspeciaj maizo, sorgo k.a. Ĉeng Joŭĝi kaj aliaj ok komunumanoj kune starigis dosierojn por ĉiuj kulturataj specioj por detale noti la tempojn de semado, ekĝermo, spikiĝo kaj maturiĝo de diversaj specioj kaj la stato de surkampaj flegadoj kiel sterkado, akvumado, insektoekstermado, forigo de la stamenoj kaj fekundigo per poleno k.a. Li ofte flegadis sur la kampo, serioze observante fazojn de la kreskado de la plantidoj. Li portis kun si malvarman solidan farunaĵon kiel manĝaĵon; kaj kontraŭ dormemo li havis akvon por duŝi sian kapon. Jen lia kutima parolo:

*Hardiĝas homo en malfacilo;  
Akriĝas glavo sur akriĝilo.*

Por konstrui novan socialisman kamparon oni devas disvolvi la spiriton de entreprenemo en malfaciloj.

En la jaro 1969, li enkondukis bonan specion de sorgo. Sed en unu nokto la fortikaj, verdaj plantaĵoj tute nigriĝis kaŭze de frua alveno de prujno. Kvankam tio kaŭzis al li doloron, tamen li ne perdis la kuraĝon. El dekmiloj da velkintaj sorgoj en la eksperimenta kampo li elektis ĉiujn jam maturiĝintajn spikojn kiuj portis plenajn grajnoj. Kaj tiajn sorgosemojn li semis en la teron en la sekvanta printempo. Aŭtune li elektis denove dekojn da plej frue maturiĝintaj spikoj. Tiamaniere jaro post jaro li selektis en difinita direkto, tiel ke fine en la 9 muoj da eksperimenta kampo aperis bona rikolto kun pomua produktkvanto de pli ol 650 kg.

Kiam disfamiĝis la sukceso de kulturado de novaj bonspecioj de la nomita brigado, de aliaj lokoj venis unu post alia petoj pri semo de bonaj specioj. Por helpi fratajn unuojn la brigada partia filio decidis vastigi la selektejon ĝis 150 muoj kaj difinis al ĝi celon alstrebotan.

*Ĉeng Joŭĝi (la unua de maldekstre) esploras pri hibridigo de sorgo kune kun komunumanoj.*



En la kulturado de la sorgo "Jiza 10", komence li semis patrinajn semojn 25 tagojn antaŭ la semado de patraj laŭ la instrukcio de libro. Sekve de tio, la tempoj de florado ne akordiĝas inter si kaj ne estis rikolto. Tiam sorgon kulturis ankaŭ la 3-a produkta grupo, sed pro manko de laborfortoj ili semis patrajn semojn malpli frue je 3 tagoj ol difinite en la libro, kaj pro tio akordiĝis la flortempoj. Sed la rikolto ankaŭ ne estis bona pro la malgranda fekundiĝa kapablo de pistiloj sur patrinaj plantoj. Analizante la malsukcesojn Ĉeng Joŭĝi trovis ke la malalta produkto havas du kaŭzojn. Poste, li elektis pli ol 100 patrajn kaj patrinajn plantojn kaj faris anatomiajn esplorojn dum pli ol 100 tagoj kaj fine eltrovis leĝon de akordiĝo de flortempoj. Krome, li rigore kontrolis la purigon de la semo kaj intensigis surkampa flegadon por fortigi la kapablon de fekundiĝo. En la lastaj tri jaroj, la pomua produktokvanto de la hibrida sorgo restas stabile super 400 kg. kaj cetere eĉ kreiĝis produkta

rekordo de pli ol 500 kilogramoj de maizo selektita de li.

Prenante la selektejon kiel bazon, li servas tutkore al la produktado, konforme al la lokaj bezonoj. Krom sorgo kaj maizo li elkulturas bonspeciojn de rizo, tritiko, batato k.a. sume pli ol dek plantojn. La eksperimentataj plantspecioj jam pliiĝis de kelkaj ĝis pli ol 2,000. Antaŭe oni mane forigis stamenojn, kaj nun tion faras per kemiaĵo kaj uzas radiadon en kulturado de novaj specioj. La de ili elkulturitaj bonspeciaj semoj de diversaj plantaĵoj estas liverataj ne nur por lokaj uzoj, sed ankaŭ por provizi aliajn lokojn en kvanto de pli ol 190 tunoj. En 1971 Ĉeng Joŭĝi fariĝis membro de Sinergia Esplora Grupo de Hebej-provinco pri Utiligo de Supereco de Hibridaj Plantaĵoj kaj estis ŝarĝita de la ŝtato per 4 esploraj temoj. Juna Ĉeng Joŭĝi decidis en si dediĉi sian tutan vivon por konstrui novan socialisman kamparon.

#### *Lernado de sperta agrikulturisto*



# Ĉefflegistino

## Tan Hujlan

ĈIUFOJE je mencio de la nomo Tan Hujlan, ĉiuj en la Hospitalo n-ro 159 de la Ĉina Popola Liberiga Armeo laŭdas, ke ŝi estas bona ĉefflegistino.

Post diplomiĝo de supera mezlernejo en aprilo de 1964, Tan Hujlan komencis labori kiel flegistino en la sekcio de infektaj malsanoj de la dirita hospitalo. Tiam ŝi pensis, ke komenciĝas ŝia nova vivo, kaj ke fine venis la tago kiam ŝi povas servi al la popolo. La sekvintan tagon kiam ŝi unuafoje enpaŝis la ĉambron por malsanuloj, ŝi trovis, ke ĉio en ĝi estas nova por ŝi. Tiam ŝi ĉiam laboris ĝoje kun neelĉerpebla energio. Jen alportante akvon kaj manĝojn al la pacientoj, jen purigante tablojn kaj plankon, ŝi neniam plendis pro laciĝo. Sed la vojo antaŭen ne estis ĉiam glata kaj ebena. Foje kiam ŝi purigis necesejon, kelkaj mezlernejaj kunlernintoj venis por vidi ŝin. Ŝi fervore akceptis ilin kaj libere interbabilis kun ili. Kiam ili menciis, ke iuj el iliaj kunlernintoj estis akceptitaj en universitaton kaj aliaj fariĝis instruistoj aŭ laboristoj, unu el la vizitantoj diris al Tan Hujlan kun esprimo de bedaŭro: “Kial vi preferas labori kiel flegistino kaj nur fari servon al la aliaj, post kiam vi studis pli ol dek jarojn?” Aŭdinte tion ŝi tuj ruĝiĝis pro honto kaj ne povis eligi eĉ unu vorton post longa tempo. Tamen pensoj kirliĝis en la kapo kvazaŭ bolanta akvo.

Sub peza spirita ŝarĝo ŝi ne plu laboris tiel energie kiel antaŭe. Ofte ŝi sola sidis senvorte kun vizaĝo kontraŭ muro. Kiam ŝi renkontiĝis kun konatoj survoje, ŝi ĉiamaniere evitis ilin. Foje, kiam ŝi lavis absceson sur la gambo de iu paciento, fetoro penetris en ŝian nazon. Ŝi haste finis la

lavadon kaj rapide foriris. Konstatinte tion la partia organizo pli atente edukis ŝin. Sub brila lampo en iu vespero, kamarado Hu, estro de flegista grupo, studis kune kun Tan Hujlan la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj legis pri la avangardaj kondutoj de Lej Feng, fame konata bona soldato de Prezidanto Maŭ. Fine kamarado Hu diris fideme kaj espereme: “Ni devas labori, same kiel Ĝang Side kaj Lej Feng, por la interesoj de la popolo tutkore kaj tutanime!” La instruo de Prezidanto Maŭ, la noblaj kondutoj de la herooj kaj la helpo de kamarado Hu eklumigis ŝian koron. Ŝi rememorigis al si la suferplenan almozulan vivon kiun ŝi pasigis kune kun la patrino dum sia infaneco antaŭ la Liberigo kaj faris komparon kun la feliĉaj tagoj de ŝia studo en la lernejo post la Liberigo. Ju pli ŝi enpensiĝis, des pli ŝi sentis honton. En sia taglibro ŝi skribis: “Ankaŭ la flegado de malsanuloj estas glora laboro por servi al la popolo. En nia granda socialisma patrolando estas nur malsameco de laborspecoj, sed ne diferenco de nobleco de laboroj. Hodiaŭ ĉe ni troviĝas nur senesperaj pensoj, sed ne senesperaj laboroj. Ekde nun mi dediĉos mian tutan forton kaj energion al mia laboro kiel flegistino.”

De tiam Tan Hujlan ĉiam klopodis bone plenumi sian laboron kaj traktis malsanulojn kiel siajn parencojn. Ĝu Duanĵen, PLA-ano de Vuhan, kiu enhospitaliĝis pro malmoliĝo de hepato, plurfoje svenis. Tan Hujlan flegis kun arda zorgemo tiun malfortan pacieron kun grava malsano. Homoj kun hepat-malsano ofte ne ŝatis manĝi, tial ŝi ĉiel klopodis manĝigi lin. Ĝu Duanĵen ne ŝatis lakton, kaj ŝi iris speciale al fabokazeo-farejo por havigi al li fabolakton. Foje, pro manko de apetito, kamarado


Ĝu volis manĝi enladigitajn fruktojn, sed tio ne estis havebla en la hospitala butikoj. Sen preno de tagmanĝo ŝi tuj iris pli ol kvin kilometrojn al la urbo kaj aĉetis tie por li enladigitajn mandarinojn

Dank' al pli ol kvin-monata zorgema kuracado kaj flegado Ĝu Duanĵen resaniĝis. En la tago de foriro de la hospitalo, kamarado Ĝu firme premis la manojn de Tan Hujlan kaj diris al ŝi kun ĉagreno pro disiĝo: "Tanjo, ja multon vi faris por mia resaniĝo!" El la dankoplenaj vortoj kaj firmaj paŝoj de la foriranto, Tan Hujlan ankoraŭ pli klare vidis la signifon de sia laboro kaj decidis pli bone servi al la malsanuloj, por ke ili rapide resaniĝu kaj kiel eble plej frue revenu al sia laborposteno.

Kun arda entuziasmo Tan Hujlan sin dediĉis al sia laboro kaj neniam lasis sin stari senfare. Kiam venis urĝa tasko, ŝi meminitative plenumis deĵoron. Foje, je la unua horo noktomeze, ŝi estis preta hejmeniri post laboro. Informiĝinte ke du malsanuloj petis enhospitaliĝon, ŝi senhezite restis kaj helpis flegistinojn Malgranda Liu akcepti ilin. Malgranda Liu plurfoje petis ŝin preni noktan manĝon kaj poste iri dormi, sed ŝi neniel konsentis kaj daŭre laboris pli ol unu horon. Tuj poste ŝi denove klopodis havigi manĝaĵon al la tri kamaradoj kiuj akompanis la malsanulojn al la hospitalo kaj devis reveni sam-nokte al sia garnizonejo. Kiam ŝi sciigis ke la horo por nokta manĝo jam pasis kaj la kuiristoj profunde endormiĝis, ŝi ne volis ĝeni ilin kaj decidis mem kuiru manĝaĵon. Aŭdinte pri tio, ankaŭ Ju Erŝun, administranto de la manĝejo venis por helpi. Baldaŭ pelvo da varmaj vermiĉeloj estis pretigita kaj alportita al la tri kamaradoj. Manĝante la vermiĉelojn faritajn de kamaradino Tan mem tiuj kamaradoj sentis neeldireblan varmon en la koro. Kiam ŝi revenis al sia dormĉambro akompaninte la gastojn al la veturilo, jam batis la kvara, kaj restis malmulte da tempo ĝis la tagiĝo. Je la sepa horo ŝi denove revenis al la hospitalo kaj komencis labori.

Neniu povas diri kiom da similaj aferoj Tan Hujlan faris dum la pasintaj naŭ jaroj. Ĝuste kiel paciento Guo diris: "La horloĝo ĉiam zorgas pri la horoj, sed Malgranda Tan neniam zorgas pri la horoj dum ŝi estas servanta al pacientoj."

Ĉiuj en la hospitalo tre estimas Tan Hujlan kaj ankaŭ sentas maltrankviliĝon pro tio, ke ŝi laboras senlace, egale ĉu en la tago, ĉu en la nokto. La gvidantoj ne permesis ŝin labori ekstrejn horojn, la kamaradoj konsilis al ŝi zorgi pri sia sano, kaj



*Kuiru manĝon por pacientoj*

ankaŭ la malsanuloj admonis ŝin pli multe ripozi. Ŝi respondis jene: "Servante al la popolo oni ne devas zorgi pri la horoj. La laboro estas iom laciga, sed tio faras min feliĉa."

Estis vespero en frua aŭtuno. Tan Hujlan estis absorbite foliumanta malsanulajn registrojn, kontraŭ ŝi alblovis malvarma vento kaj ŝi tuj iom tremis. Ŝi ekstaris kaj rapidis al la malsanulaj ĉambroj por rigardi, ĉu ĉiuj pordoj kaj fenestroj estis bone fermitaj aŭ ne. Kiam ŝi eniris en ĉambron n-ro 419 por fermi la fenestrojn, ŝi rimarkis, ke la dekstra gambo de Jang Guoĉen sur lito n-ro 4 moviĝis kaj la vatita litkovrilo malsupren glitis de sur lia maldekstra pendigita gambo. Tan Hujlan haste iris por reordigi la kovrilon, sed neniel povis bone kovri la maldekstran gambon, ĉar ĝi estis operaciita kaj devis esti pendigita je unu-futa alteco super la lito. Ŝi pensis, ke la malvarma vetero tuj proksimiĝos, kaj oni devas fari aranĝon ke li dormu pli komforte. Tial ŝi intencis havigi al li vatitan piedveston. Dum la tagmeza libertempo de la sekvinta

tago, Tan Hujlan alportis ŝtofon kaj kotonon, senĉese laboris du horojn kaj sukcese kudris dikan pied-veston. Tiuvespere, kiam la vatita pied-vesto estis surmetita al la piedo de Jang, la lasta estis forte kortuŝita. En la tria tago aperis sur la hospitala murgazeto artikolo de Jang, en kiu li diris: "La vatita pied-vesto estas malgranda, tamen sur ĝi troviĝas la profunda klasa amikeco de kamaradino Tan. Ŝi estas tre zorgema pri la malsanuloj; ŝi faras ne nur ĉion, kion ili deziras, sed ankaŭ tion, kion ili preteratentas."

Tan Hujlan ne kontentiĝis je sia atentoplena flegado kaj sia zorgemo pri la ĉiutaga vivo de la malsanuloj. Ŝi ankaŭ multe atentis pri ilia ideologia progreso. Ŝi ofte studis kune kun ili verkojn de Prezidanto Maŭ, legis por ili ĵurnalojn kaj babilis kun ili pri la internacia aŭ enlanda situacio. Krome ŝi helpis la malsanulojn havi korektan sintenon kontraŭ sia malsano, por ke ili aktive kunlaboru kun la kuracistoj. Juna soldato Li Mejking estis brulvundita en batalo kontraŭ fajrego por protekti ŝtatan proprajon. Post certa periodo da kuracado la brulvundo estis resanigita. Tiam Tan Hujlan kaj aliaj kamaradoj estis pretaj helpi lin renovigi la funkcion de liaj membroj. La paciento tre ĝojis pro tio, sed poste kiam li vidis siajn cikatroplenajn membrojn, li iom deprimiĝis. Kuntirante siajn brovojn li demandis Tan Hujlan: "Miaj membroj ne povas kurbiĝi. Ĉu mi ankoraŭ kapablas piediri kaj labori?" Por havigi al li fidon Tan Hujlan studis kune kun li instruojn de Prezidanto Maŭ kaj rakontis al li kiel multaj herooj kripligitaj revenis al sia laborposteno post venko de fizikaj malhelpoj per persistemo. Ŝi diris kuraĝigante lin: "Certe ankaŭ vi povos tion fari, nur se vi havas fortan revolucionan volon kaj ĉiam ekzercos vin kun obstina penemo." Aŭdinte ŝiajn vortojn la lasta tuj esprimis sian decidon venki la sekvojn de sia vundiĝo por la revolucio. Tan helpis lin ellabori planon pri korpa ekzerco. Ekde tiam Tan Hujlan regule venis al Malgranda Li ĉiutage kaj lin helpis dum li sin ekzercis por refunkciigi siajn membrojn. Sub la entuziasma helpo de Tan kaj aliaj kamaradoj Malgranda Li persistis en ekzercado timante nek doloron nek laciĝon. Fine liaj membroj bone refunkciis kaj li reiris al sia posteno.

En la jaro 1970 Tan Hujlan fariĝis ĉeflegistino. Ŝi profunde komprenis, ke tio rezultis el la konfido de la Partio, kaj ŝi ankaŭ sciis, ke la ŝarĝo sur ŝia ŝultro estis pli peza. Depost tiu tempo ŝi, kiel ĉeflegistino, laboris pli atenteme kaj diligente. Ŝi ne nur plenumis ĉiun laboron donante elstaran ekzemplon

sed ankaŭ direktis sian zorgon al la junaj geflegistoj de sia sekcio rilate al ilia vivo kaj ideologio, fervore konatigis al ili sian propran sperton kaj diligente helpis ilin formi bonan laborstilon por ke ili trapasu hardiĝon kaj rapide progresu. Kiam Li Ginjing ĵus komencis labori en la sekcio pri brulvundoj kiel flegistino, ŝi estis iom timema, ĉar ŝi ne bone konis la fleglaboron. Konstatinte ion Tan Hujlan ĝustempe interparolis kun ŝi kaj helpis ŝin starigi la penson diligente lerni teknikon por la revolucio. Samtempe ŝi fervore instruis al ŝi labor-procedon, klarigis laŭvorte la regularon pri flegista laboro kaj praktikigis ŝin pri vejna punkcio sur ŝia korpo. Pro ŝia helpo Li Ginjing venkis sian timemon, rapide posedis fundamentan scion pri flegado de brulvunditoj kaj kapablis labori kun fido.

Kiel flegistino kaj ĉeflegistino Tan Hujlan laboris sinsekve en kvin sekcioj de la hospitalo. Neniu el la malsanuloj, kiuj ricevis la flegadon de Tan

#### *Helpi pacienton en ir-ekzerco*



Hujlan, ne estis kortuŝitaj pro ŝia spirito de tutkora kaj tutanima servado al la popolo kaj starigis kun ŝi profundan amikecon.

Kiom da homoj dankis ŝin pro ŝia zorgema flegado kaj kiom da homoj laŭdis ŝian spiriton de helpemo! Tamen Tan Hujlan ĉiam diris: "Mi faris ankoraŭ tre malmultan kontribuon por la revolucio kaj la popolo."



*Tan Hujlan (la dua de maldekstre) lernas modelajn agojn de heroo kune kun flegistinoj*



## Kurantaj Aferoj



### ARO DA ELEKTREJOJ KONSTRUITAJ EN REGIONO BAJSE

La regiono Bajse de Guanghi situas sur Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenejo, kie loĝas golaŭoj, mjaŭoj, jaŭoj, jioj, ĝŭangoj, hanoj kaj aliaj naciecoj. Kvankam tie troviĝas abunda akvofonto, tamen neniu elektrejo estis konstruita en tiu regiono antaŭ la Liberiĝo, tial terebinto kaj bambuoj fariĝis por ili lumigiloj.

Post la Liberiĝo la ŝtato donis multan helpon kaj subtenon al tiu regiono per homfortoj kaj materialoj. En la jaro

1958, la diversnaciaj popolanoj konstruis tie la unuan ĉefan kaj plurajn malgrandajn hidraŭlikajn elektrejojn. Dum la Granda Proletara Kultura Revolucio la ŝtato ankoraŭ konstruis tie laŭplane kaj laŭpaŝe aron da ĉefaj hidraŭlikaj elektrejoj, kaj samtempe granda nombro da malgrandaj elektrejoj estas konstruitaj kaj funkciigitaj de komunumoj kaj brigadoj mem. Nun, en tiu regiono 577 hidraŭlikaj elektrejoj mezaj kaj malgrandaj estas starigitaj, kies instalita kapacito atingis pli ol 49,000 kilovatojn, tiel ke formiĝis elektra reto.

Dank' al tio konstruiĝis tie unu post alia pli ol 500 lokaj fabrikoj kaj minejoj de ferŝtalo, maŝinoj, kemisterko, karbo, ŝpinteksado kaj aliaj. La totala industria produktovaloro de la tuta regiono en 1972 kreskis je 18.1% kompare kun tiu de 1971, kaj pli ol 28-oble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.



# Ekflugi en la Aero

**G**RUPO da “arĝentaj agloj” ŝvebas super la aerodromo de iu aviada lernejo de la aeraj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. La stiroj de tiuj flugmaŝinoj estas aviadlernantinoj, kiuj antaŭe estis ordinaraĵ mezlernejaninoj, kreskantaj hardite en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Tamen por fariĝi veraj aviadistoj ili trapasis rigorajn provojn.

## LA UNUA VENKO

Iun tagon iris la unua ekzerco de solpersona flugo por la lernantinoj. Kiam unu aeroplano surteriĝis post flugo apud T-forma signal-tuko kaj glitis ekvilibre sur la kurejo, la signalisto alten levis sian ruĝan flagon en la mano por anonci pri bona surteriĝo.

La aviadistino de tiu aeroplano nomiĝas Hie Ĵujhua, kiu estas filino de ministro. En 1968 ŝi estis akceptita en la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kaj poste sendita al la aviada lernejo por lerni aviadarton. Foje rompiĝis al ŝi la maleolo de la dekstra piedo dum ekzercado de malsuprenglitado kaj oni portis ŝin al hospitalo.

Kuŝanta sur malsanula lito Hie Ĵujhua ĉiam pensis pri la aviada lernejo. Kun granda maltrankvileco ŝi demandis al la kuracisto: “Ĉu mi ankaŭ povos daŭrigi mian lernadon de aviado?” “Estu trankvila kaj bone ripozu,” konsolis la kuracisto, “vi povos aviaĉi kiel antaŭe post resaniĝo.”

Dum la restado de Hie Ĵujhua en la hospitalo, la gvidantaj kamaradoj de la aviada lernejo alportis al ŝi teoriajn librojn pri aviado kaj petis iun instruiston, kiu kuraciĝis en la sama hospitalo, ŝin helpi por ke ŝi ne perdu la tempon. En ĉiu mateno Hie Ĵujhua ekzercis sian korpon sub la helpo de flegistino. Kiam ŝi komencis forlasi la lambastonon por stari plene sur la piedoj, ŝi sentis akran doloron ĉe la vundloko. Tiam ekaperis en ŝia memoro la afabla mieno de Prezidanto Maŭ,

kiun ŝi vidis dum lia akcepto de ruĝaj gvardianoj en la granda kultura revolucio, ŝi tuj ekhavis por si grandan apogforton. Forte kunpremante la dentojn, ŝi stariĝis kun mano apoganta sur la lito kaj faris kun granda peno la unuan paŝon kaj la duan....

Post kvin monatoj en la hospitalo Hie Ĵujhua ne nur reakiris la funkciojn de sia dekstra piedo, sed ankaŭ brile sukcesis en lernado de teoriaj scioj pri aviado. Konsiderante la fortan deziron kaj sanstaton de Hie Ĵujhua, la gvidantoj de la aviada lernejo konsentis al ŝi daŭrigon de sia lernado de aviado.

Hodiaŭ, kiam Hie Ĵujhua ĝoje eliris el la aeroplano post plenumo de solpersona flugo, la instruistoj kaj kunlernantoj konkure kuris al ŝi por gratuli ŝian unuan venkon.

*Pilotinoj rigardas ekzercadon de siaj kunbatalantoj.*





*He Juhua antaŭ flugo en solo*

## VENKADO DE MALFACILAĴOJ

Post eniro en la aviada lernejo, Li Venĝen plenkore deziris praktikan flugon al la ĉielo. Ŝi aŭskultis atenteghe, lernis pene kaj enmemorigis energie ĉiujn lecionojn. Pri malfacile kompreneblaj punktoj en la lernado ŝi ĉiam klopodis studi antaŭ ol ŝi tute konis ilin. Pro tio ŝi progresis rapide kaj la unua en la klaso faris solpersonan flugon. Tamen ŝi malsukcesis en praktiko de surteriĝo en flanko vento sub la gvido de la instruisto.

Antaŭ la flugo la instruisto jam klare instruis al ŝi la atentindaĵojn kaj ĉefajn postulojn en manipulado. Tamen ŝiaj manipulaĵaj movoj post la horizontaliĝo antaŭsurteriĝa estis ne ekzakte faritaj laŭ la instruo. Kaj en la ripeta ekzerco ŝi ankaŭ ne progresis. Simile al sovaĝa ĉevalo la aeroplano forte saltadis sur la kurejo.

Post la flugo, Li Venĝen pensis kun granda ĉagreno: "En la malnova socio, la patro laboris ĉe bienulo kiel dungito dum duona vivo. Hodiaŭ la Partio sendis min al la aviada lernejo kaj mi ja devas rapide posedi la aviadan teknikon por servi al la socialisma patrolando. Sed, mi sinsekve malsukcesis en miaj flugoj. Al kiu mi povas turni mian vizaĝon kun trankvila konscienco? Kaj

en kio estas la kaŭzo de miaj malsukcesoj? Ŝi introspektis pri sia animstato dum la lasta tempo kaj trovis, ke al ŝi kreskis iom post iom memkontento, kun la penso, ke aliĝo al la Partio kaj plenumo de solpersona flugo antaŭ la aliaj kunlernantoj konstatas, ke ŝi bone progresis kaj ke ne estas malfacila tasko ellerni la aviadarton. Pro tio ŝi lernis ne tiel pene kaj serioze kiel antaŭe.

Trovinte la kaŭzojn de la malsukcesoj Li Venĝen klopodis elimini sian memkontentecon kaj rigore traktis sin mem. Iun fojon, kiam ŝi ekzercis sin en flugado sub la direktado de sia instruisto ŝi ne povis trovi la ĝustan malsuprenlitan punkton deviate jen antaŭen jen malantaŭen. Poste ŝi detale raportis al la instruisto siajn manovrajn procedojn por ke la lasta montru al ŝi mankojn, kaj petis lin ankoraŭfoje akompani ŝin en denova flugado kaj demonstri al ŝi ĝustan kaj malĝustan manovroprocedojn. Post la plenumo de la flugo, kiam iu alia faros la saman ekzercon, ŝi petis akompani ŝin en la aeroplano por observi ties manovradon. Kiam ŝi plene konis ĉiujn detalojn de manipuloj dank' al multfojaj flugoj, ŝi komencis ripetadi la movojn sur ekzercoaparato. Tiel Li Venĝen venkis ĉiujn malfacilojn en spertiĝo de flugado.

## ANTAŬENMARŜO PER FIRMAJ PAŜOJ

Iutage kiam Li Jancun post blinda flugo petis sian instruiston fari al ŝi rimarkojn, tiu postulis ke ŝi mem unue kontrolu sian manovradon dum la flugado. Laŭ la notoj en sia fluga libro ŝi detale rememoris ekzamenante la tutan procedon de stirado por formi al si juĝojn pri la ĝustaj kaj malĝustaj movoj. Post kiam ŝi jam havis klaran ideon, la instruisto diris al ŝi siajn rimarkojn klarigante per helpo de modelo de aeroplano. Li Jancun atente aŭskultis kaj faris detalajn notojn.

Kial la instruisto tiel procedis?


Li Jancun estas filino de iu revolucia kadro. Post armeaniĝo en 1969 ŝi progresis rapide kaj estis akceptita en la Komunistan Partion de Ĉinio. En aŭtuno de 1971 ŝi estis elektita al la aviada lernejo. Kun bona kompren-kapablo, ŝi ĉiam emis eltrovi ian rapidan vojon kondukantan per unu paŝo al granda atingo.

Foje antaŭ la ekzerco de surteriĝo laŭ la kurejo en flanko vento, la instruisto detale kaj emfaze klarigis al ŝi la uzendajn procedojn de manovrado. Sed kiam ŝi flugis en la aero, ŝi ne agis tute ekzakte laŭ la instrukcioj, opiniante ke la flugado aspektus

ne elegante, se ŝi tiel agus. Pro tio rezultiĝis, ke la aeroplano ne povis surteriĝi en la kurejon. Kiam ĉagrenite kaj maltrankvile ŝi provis korekti la direkton, la aeroplano deviis jen dekstren jen maldekstren kun forta skuiĝo en la aero. Fine la aeroplano surteriĝis en sekuro nur dank' al helpo de la instruisto. Sub la helpo de la gvidantoj kaj kamaradoj ŝi serioze analizis, resumis la kaŭzojn de siaj mispaŝoj en flugado kaj ekkonis siajn erarojn, kaj decidis korekti ilin lernante la bazan teknikon paŝon post paŝo.

De tiam Li Jancun pli modeste aŭskultis la opiniojn de instruistoj kaj kamaradoj, raportis ĉion pri si al la gepatroj kaj petis ankaŭ helpojn de ili. Dum flugado ŝi rigore sekvis la instrukciojn de la instruisto kaj ne malobservis ilin facilanime.

Foje, dum blinda flugo sub la gvido de la instruisto, ŝi subite aŭdis, ke la aeroplano eligis nekutiman sonon. En palpebruma daŭro la aeroplano akute malleviĝis. Tiam la instruisto tuj sciigis al ŝi ke la motoro paneis! Li Jancun komprenis la danĝeron de la kazo kaj konsciis ke ŝi nun alfrontas rigoran provon. En tiu kriza momento ŝi agis kuraĝe kaj aplombe laŭ la vortoj de la instruisto, rapide direktis supren la aeroplanon kaj reguligis la maŝinon. Post forigo de la perturbo, la "arĝenta aglo" denove flugis glate en la aero.



*Li Jancun revenas de flugado.*



*Li Venĝen purigas aeroplanon.*

# Estu kamparanoj!


— Konsilo de Prof. Ĝaŭ Hongĝang al siaj gefiloj

VIVI kaj labori kun la kamparanoj fariĝis jam moro de la intelektaj gejunuloj de Ĉinio. Ilia agado ricevis subtenon de siaj gepatroj kaj bonvenon de la komunumanoj. Jen rakonto pri Prof. Ĝaŭ, kiu konsilis al siaj gefiloj sekvi tiun moron.

Ĝaŭ Hongĝang, profesoro de Nordokcidenta Agronomia Kolegio, estas komitatano de la Ŝenhi-provinca Komitato de KPĈ kaj landfama kulturisto de tritikosemoj. De multaj jaroj, li ne nur faris rimarkindajn kontribuojn al agrikulturo, sed ankaŭ bone instruis siajn gefilojn, ke ili komprenu, ke agrikulturo estas bazo de la nacia ekonomio, ke ili devas vivi en la kamparo, ricevi edukon de mal-

riĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj preni sur sin la pezan taskon de konstruado de nova socialisma kamparo.

En 1962, Prof. Ĝaŭ sendis sian filon Ĝaŭ Bi, diplomiton de instruista lernejo, al kamparo. Antaŭ foriro de la filo, Prof. Ĝaŭ zorgplene diris al li: “Tenu enkore la vortojn de Prezidanto Maŭ: **‘La kamparo estas vasta mondo, tie oni povas multon fari.’** Se la kamparo prosperos, la socialisma konstruado povos efektiviĝi pli rapide kaj pli bone. Krome, la kamparo estas ankaŭ bona loko por vin hardi. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj arde amas Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio, ilia starpunkto es-



*Ĝaŭ Hongĝang (la maldekstra) interparolas kun agrikultura labormodelo Vang Baŭging.*

*Ĝaŭ Hiang interparolas kun reprezentantoj de intelektaj gejunuloj ekloĝigintaj en kamparo, dum la Oka Kongreso de la Komunisma Junulara Ligo de Vugong-gubernio, Ŝenhi-provinco.*



tas firma, kaj ili bone distingas, kiujn ili devas ami kaj kiujn ne. Ili estas ankaŭ diligentaj kaj kuraĝaj. Ili estas bonaj instruistoj de ni intelektuloj.” Kun tia admono lia filo Ĝaŭ Bi suriris la vojon vivi kaj labori en la kamparo.

Prof. Ĝaŭ estas ĉiam senindulga al siaj gefiloj. Por kulturi ilian amon al la kamparo kaj la laboranta popolo, li ofte rakontis al ili siajn proprajn spertojn, precipe tiujn de sia vivo inter la laboristoj kaj kamparanoj post la Liberiĝo.

Prof. Ĝaŭ Hongĝang okupiĝis pri kulturado de tritikosemoj jam pli ol 30 jarojn. Antaŭ la Liberiĝo, la tritika produktokvanto en suda Ŝenhi-provinco estis malalta, la subpremado de Kuomintang estis kruela, kaj la vastaj amasoj de kamparanoj tie vivis tre mizere. Tio vekis profundan simpatian de Prof. Ĝaŭ. Sed influite de la burĝara ideo “savi Ĉinion per scienco” li opiniis, ke se nur oni trovos bonajn tritikosemojn, kiuj povos alporti riĉan rikolton, la vivstato de la laboranta popolo pliboniĝos. Sekve li sin ĵetis en sciencajn esplorojn ignorante ĉion ceteran. Tamen lia kulturado de bonaj semoj ricevis nur mizeran frukton.

Post la Liberiĝo la supereca socialisma soci-sistemo donis al li bonajn kondiĉojn. Prizorgata kaj kuraĝigata de la Partio, li diligente lernis Marksismon-Leninismom kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, kritikis la ideon “savi Ĉinion per scienco”, akceptis la mondkoncepton “tutkore kaj tutanime servi al la popolo” kaj ŝanĝis la malnovan manieron fari sciencajn esplorojn en kabineto. Li

ofte vivis en la kamparo, lernis de la amaso kaj esploris kune kun ili problemojn de agrikultura produktado. Tiamaniere li sukcesis elkulturi iun specon de bona tritikosemo “Fengĉan (riĉa rikolto) n-ro 3”, kiu estas alt-produktema, bonkvalita kaj rezistema kontraŭ vento, sekeco kaj troa pluvado. Kun profunda konvinko li diris al siaj gefiloj: “Vivi inter laboristaj kaj kamparanaj amasoj estas la sola revolucia vojo por intelektuloj. Se ili volas servi al la laboristoj kaj kamparanoj, ili devas kompreni unue iliajn vivon, laboron kaj penson, kaj por tio ili devas vivi inter laboristoj kaj kamparanoj. Se la intelektuloj ne partoprenas produktadon kaj ne vivas inter laboristoj kaj kamparanoj, estas neeble por ili havi penson kaj senton de la laboranta popolo, sekve ne estas eble bone servi al la lasta.” La propraj spertoj de Prof. Ĝaŭ multe inspiris liajn gefilojn. Ili, du filoj kaj du filinoj, iris sinsekve al kamparo kaj fariĝis kamparanoj.

Kvankam Prof. Ĝaŭ estas tre okupata, li tamen ĉiam prizorgas la progreson de siaj gefiloj irintaj al kamparo kaj ofte skribas al ili. En februaro 1971, Prof. Ĝaŭ partoprenis en Jan-an la Kvinan Partian Kongreson de Ŝenhi-provinco. Tie li skribis longan leteron al siaj gefiloj. Li rakontis al ili la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ en la periodo, kiam Jan-an estis centro de la ĉina revolucio, kaj konsilis ilin nepre heredi la revolucionan tradicion. En aŭtuno samjara, dum sia vizito al la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en Kantono li informiĝis pri la modela agado de Li

Pingping, pekina intelekta junulino vivanta sur paŝtejo de Interna Mongolio. Li tuj tion sciigis al la gefiloj kaj konsilis ilin lerni de ŝi. Foje, kiam li aŭdis, ke lia dua filino Ĝaŭ Fang intencis forlasi la kamparon kaj eklabori aliloke, li tuj skribis al ŝi, ke ŝi restu en la kamparo por sin hardi. Intertempe li ankaŭ vizitis la vilaĝojn, kie liaj gefiloj vivis, por koni detale ilian staton. Li aŭskultis iliajn rakontojn pri iliaj progresoj en la kamparo, vizitis koncernajn gvidantojn kaj komunumanojn por peti opiniojn pri liaj gefiloj, kaj poste konsilis al ili laŭbezone. Foje li estis informita, ke lia dua filo Ĝaŭ Hiang ne volas esti librotenisto de produkta brigado, tiam li pacience persvadis lin obei la postulon de revolucio kaj tutkore kaj tutanime servi al la popolo. Fine, Ĝaŭ Hiang memvole prenis sur sin la laboron de librotenisto. Iom poste li aŭdis, ke Ĝaŭ Hiang ne tiom multe partoprenis korpan laboron kiel antaŭe, kiam li ankoraŭ ne estis librotenisto. Li do serioze montris al la filo, ke for de korpa laboro, for de la popolamaso, oni neniel povas bone plenumi sian taskon. Ekde tiam Ĝaŭ Hiang ĉiam memoras la konsilon de la patro kaj regule partoprenas korpan laboron.

Prof. Ĝaŭ ankaŭ ofte instigis siajn gefilojn servi al la kamparo per siaj sciencaj scioj. Profitante siajn agrikulturajn esplorojn li ofte sendis al ili bonajn grensemojn, teknikajn librojn kaj sciencajn materialojn pri agrikulturo, kaj konsilis ilin

partopreni en korpa laboro kaj samtempe praktiki sciencajn metodojn en agrikulturo. En 1965, li sendis la de li ĵus elkulturitajn bonajn tritikosemojn "Fengcān n-ro 3" al lia filo Ĝaŭ Bi en Henan-provinco, ke li disvastigu ĝian kulturadon.

Dank' al la edukado de kamparanoj kaj liaj konsiloj, liaj gefiloj bone progresas. Lia unua filo Ĝaŭ Bi aktive partoprenas en agrikulturaj laboroj, kaj faris siajn kontribuojn en disvastigo de bonaj gren-semoj, en prov-farado de grenprotektaj kemiaĵoj, en plibonigo de irigaciaj maŝinoj ktp. Pro tio, li estis laŭdita de la loka popolamaso, kaj estis rekomendita al la gubernia stacio de bonaj gren-semoj. La unua filino Ĝaŭ Lin nun fariĝis lerneja instruistino en popola komunumo. La dua filo Ĝaŭ Hiang estas membro de la scienca esplora grupo de sia produkta brigado. En la lastaj kvar jaroj, li kune kun komunumanoj kulturis kaj disvastigis grensemojn kaj efektivigis riĉan rikolton. Fru-maturaj maizoj de ili plantitaj ricevis sufiĉe altan rikolton de 360 kg. po muo (1/15 hektaro). Lastjare, ilia produkta brigado kulturis la plibonigitan tritikon "Fengcān n-ro 3", kaj ricevis la plej bonan rikolton en la historio de la brigado. Pro lia merito li estis lastjare delegita ĉeesti la Vugong-gubernian Kongreson de Ĉina Komunisma Junulara Ligo kaj estis elektita kiel membro de ĝia gubernia komitato. Komunumanoj diris: "Vidante tian intelektan junulon ni ĝojas elkore."



*Ĝaŭ Hiang esploras kreskadon de tritiko en la eksperimenta kampo, kune kun membroj de la scienca esplora grupo.*

# Maljuna Pentristo Kian Songjan

Fotoj de nia fotisto



La 75-jara ĉinstila pentristo Kian Songjan en laboro



紅裝素裹  
一九七二年三月謹繪 錢好古

Nega Sceno sub  
Ruĝa Suno  
de Kian Songjan






Pentristoj studas novan verkon.



Fari skizojn en fabriko



湖田新線 錢松年作

Nova Verdo sur Kamparo Cêlaga de Kian Songjan

# Kreo de novaj

## ĉinstilaj pentraĵoj

**M**I ŝatas pentri laŭ ĉina tradicia stilo ekde mia juneco kaj ĝis nun mi tion faris jam pli ol 50 jarojn. En nia lando oni ofte esprimas la rejuniĝon de maljunuloj per la esprimo: “Ju pli da jaroj, des pli da juneco”. Ankaŭ mi sentas ke mi fariĝas ĉiam pli juna.

En nia nova socialisma Ĉinio, la Partio kaj registaro tre zorgas nin maljunajn pentristojn, ne nur rilate al nia laboro kaj vivo, sed ankaŭ rilate al lernado de teorio. En la komenca periodo post la Liberiĝo, kiam mi legis la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, mi ekkomprenis ke revolucia literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ke la revoluciaj literaturistoj kaj artistoj devas eniri en ilian ardan revolucionan batalon, por esprimi kaj prikanti ilin per siaj kreaĵoj. Tiam, retrorigardante miajn pejzaĝ-pentradon dum la pasintaj pli ol 30 jaroj, mi eksentis ke miaj kreaĵoj estis tro malproksimaj de la laboranta popolo. Kiel ili povus havi superabundan tempon kaj emon por aprezi tiajn pentraĵojn kiuj temas pri montoj kaj riveroj felandaj, dum ili mizere vivis sen sufiĉa vivbezonaĵo sub la premado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo? Tiam mi laboris kiel instruisto pri belarto en pedagogia lernejo. La partia organizo admonis min iri en bolantan revolucionan amasan movadon kaj sperti ĝin. Dum la agrara reformado, mi faris pentraĵojn pri tiu movado. Ili kvankam estis ne bonaj laŭ mia opinio, la Partio kaj popolo tamen min multe kuraĝigis.

En la malnova socio, mian pentrarton pri pejzaĝoj mi lernis de kreaĵoj de la antikvuloj en mia kabineto. Post la Liberiĝo kvankam mi volis krei ion novan, plaĉan al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tamen, mi ne povis rompi la antaŭe lernitajn rutinojn de malnovaj pejzaĝaj pentraĵoj. Poste, kiam mi denove provis palpe paŝi al nova vojo, mi ripetade studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Li diris: **“Se niaj literaturaj kaj artaj laborantoj el intelektularo volas, ke iliaj verkoj estu varme akceptataj de la popolamasoj, ili devas fari radikalan ŝanĝon kaj remuldi siajn pensojn kaj sentojn.”** Lige kun mia unua paŝo en sperto de la vivo inter la popolamasoj mi iom post iom komprenis, ke mi ne povas esperi ke miaj pentraĵoj estos varme akceptataj de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, se mi ne vere posedas iliajn pensojn kaj sentojn.

Por pli bone heredi kaj disvolvi la bonan tradicion de la pentrarto de nia lando, la Partio kaj registaro ofte sendis nin viziti diversajn lokojn de la patrolando por vidi kaj studi. Mi vizitis la montojn Tajŝan, Huaŝan kaj Emejŝan, ekskursis al la Granda Muro, pririgardis la konstuejon de Sanmenhia-akvokonservejo de la Flava Rivero, kaj pilgrimis al Jan-an, Ŝouŝan, Ginggaŝan-montaro kaj aliaj revoluciaj sanktejoj kaj vojaĝis ankaŭ al Kantono, Ĉongking, Vuhan kaj aliaj urboj. La grandiozeco de famaj, majestaj montoj kaj riveroj de la patrolando, la arda entuziasmo montrita por socialisma konstruado en diversaj lokoj, kaj precipe la vizito al multaj fabrikoj kaj popolkomunumoj

multe tuŝis min kaj profunde ŝanĝis miajn pensojn kaj sentojn. La ĉiam kreskanta prospereco de la patrolando kaj la sinforĝesema laborfervorego de la laboristoj kaj kamparanoj min stimulis kaj entuziasmigis. Ĉu oni povas trovi tie ian dekadencan sentimenton kiel montris la ofte renkontataj vortoj en antikva versaĵo: “velkintaj rotangoj, maljunaj arboj kaj krepuskaj korvoj”? En tiu tempo, mi eksentis ke la pentraĵoj en mia albumo tute ne havas tiel riĉan enhavon kiel la reala vivo mem. Mi decidis iri en la ardan vivon de batalo kaj krei novajn ĉinstilajn pentraĵojn, spirantajn freŝan junecon.

Ŝanĝiĝas miaj pensoj kaj sentoj, ŝanĝiĝas ankaŭ miaj pentraĵoj. En la pasinteco, mi longe vivis ĉe la lago Tajhu, konata kiel loko abunda je fiŝoj kaj rizo, kaj havis profundan amon por ĝi, trovante ĝian pejzaĝon tre bela. Tamen sur miaj pentraĵoj estis prezentitaj nur ĝiaj verda akvo kaj bluaj montoj kun etoso malvarma. Nun, kiam mi refoje vizitis la lagon, mi vidis ke sub la gvido de la Partio, la laboruloj vivantaj ĉe la lago lernas de Daking en industrio kaj de Daĝaj en agrikulturo, tiel ke stariĝis tie tre multaj fabrikoj kaj ke la kamparo etendiĝas sur la tero kvazaŭ brokato. La objekto, kiu nun plej tuŝis mian koron, ne plu estis la pitoreska pejzaĝo de ĝia Juantoŭĝu. Dum dekoj da jaroj, kompleta ŝanĝiĝo okazis ĉe Tajhu, kaj mi estas ĝia historia atestanto. Koncentrinte mian novan senton pri Tajhu sur la penikon mi kreis en la pasinta jaro novajn pentraĵojn inkluzive de *Akva Regiono en Bela River-sudo, Mil Fiŝboatoj Plene Sarĝitaj, Nova Verdo de Tajhu*.

En la pasinteco, mi imitis en pentrarto la tutan teknikon de antikvuloj. Per tio mi tute ne povas krei pentraĵojn spegulantajn la novan epokon. Poste mi lernis la principojn elmetitajn de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo**” kaj “**forigi la malnovajn por elŝovi la novajn**”, kiu lumigis al mi la vojon. La tradicia pentrarta tekniko estas utiligebla por servi al la nuntempo, se oni sekvas la instruon de Prezidanto Maŭ, prenas ĝian sukcon kaj forĵetas ĝian rekrementon, heredante ĝin kritike kun la proletara literatura kaj arta penso kiel orientilo.


Ŝanĝiĝis la epoko, ŝanĝiĝis ankaŭ la sentimento. Rezulte de persona sperto de la nova vivo, kaptis min forta deziro, ke mi havigu novan vivon al la malnova pentrotekniko, serĉu kuraĝe novajn formojn kaj teknikojn por efike speguli la nunan realan vivon de la nova epoko. Post ripetada studo kaj prak-

tiko, mi iom progresis en mia klopodo krei novon en ĉinstila pentrarto.

El antikvaj pentraĵoj mi trovis strekajn manierojn de “fupi” kaj “pima” (nome: la unua montras ke la roko pentrita kvazaŭ estus formita per ekbato — “pi” — de hakilo — “fu” — kaj la dua montras ke la ŝtona monto estas pentrita per strekoj similaj al disfenditaj kanabŝeloj — “ma” — pendantaj de la supro — “pi” —), sed neniam strekmanieron por bildigi leŭsan altebenaĵon. Tial dum mia verkado de la pentraĵo *Himno pri Jan-an*, mi aplikis la utilajn teknikojn tradiciajn kun reformo kaj uzis novan strekmanieron por bildigi la leŭsan altebenaĵon de nordokcidenta Ĉinio.

Antaŭ nelonge, mi verkis la pentraĵon *Huang-janggie*. Antaŭ la kreado mi pilgrimis al tiu revolucia historia loko. Ĝi estas sur la pinto de Ging-gang-montaro kaj troviĝas en krute dekliva kaj grandioza situo kaj sub ĝi kuŝas abrupta, profunda valo. Prezidanto Maŭ siatempe direktis tie la Laboristan-Kamparanojn Ruĝan Armeon por kontraŭbatali la unuan “ĉirkaŭekstermon”, forbalaante la malamikojn kvazaŭ kunvolvante maton. Elkora estimo nature ekaperis en mi kaj inspiris min pentri ĝian imponan majestecon. Mi prenis suprenrigardan angulon por reliefigi ĝian altecon. Sur la bildo troviĝas verdaj pinoj, bambuoj en amasoj, kiuj aspektas pompe, prospere kaj vivece, kaj la talio de la montoj flugas nubo. La grandioza sceno de la montpinto alte staranta inter la nubaro estas tiel emfazita. Por pentri tiajn revoluciajn sanktejojn kiel tiu loko, mi ofte klopodas unuigi la revolucian politikan enhavon kun nova artformo kaj uzas helajn kaj varmajn kolorojn. Mi pentris *Ruĝa Suno super Alta Montaro* ankaŭ per fortaj koloroj de ruĝo kaj bluo. Ĉion ĉi tion mi faris laŭ la bezonoj de la enhavo disvolvante la utilan parton de la tradicia tekniko.

Ĉijare mi estas 75-jaraĝa, tamen mi ne sentas min maljuna. Kvankam mi estis juna antaŭ la Liberiĝo, tamen miaj tiamaj pentraĵoj estis kvazaŭ antikvaj antaŭ centoj da jaroj sen spiro de viveco. Post la Liberiĝo, Prezidanto Maŭ montris al mi la direkton: servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj per revoluciaj literaturo kaj arto, kaj la batala vivo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado liveris al mi senkompare riĉajn materialojn por kreado. Mi pretas dediĉi mian tutan forton al la pentrado pri nia socialisma patrolando kaj ĝiaj herooj sub la radioj de la brila literatura kaj arta penso de Prezidanto Maŭ.



*La elektro-centralo*

# Pligrandigo de elektro-centralo

de GIANG LIU

**J**E la 22-a de decembro 1972, ekfunkciis 125,000-kilovata generatora kompleto nove instalita en grandtipa elektrocentralo de Ŝanhajo. La potenca kurento provizata tra la altensiaj kabloj sur la fostoturoj ĉielo-skrapantaj al fabrikoj, kamparo, minejoj kaj aliaj lokoj portas lumon kaj varmon al la prospere disvolviĝanta socialisma konstruado de nia lando.

## POR PLI FRUE PRODUKTI ELEKTRON

Sub la gvido de la Ŝanhaja Revolucia Komitato rapide organiziĝis, en la komenco de 1972, granda trupo de konstruantoj, inter kiuj sin trovis ne nur spertaj laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj, sed ankaŭ pli multaj revoluciaj gejunuloj, kiuj ĵus aliĝis al la laboristaro. Kvankam malsamaj estas ilia aĝo kaj travivaĵo, tamen ili ĉiuj havas komunan deziron: Rapidigi la konstruadon de nia elektra industrio kaj fari novan kontribuon por la socialisma konstruado!

La vastaj amasoj de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj sindone laboris kaj aperis senĉese kortuŝaj aferoj. Juna laboristo Vu Ginbaŭ vundiĝis dum laborado, kaj li revenis al la konstruejo tuj post bandaĝado en la kuracejo. Somere, kiam la muntata subtera tubolinio de cirkula akvo kun 2.4-metra diametro etendiĝis ĝis la rivera bordo, alblovis tajfuno n-ro 12. La torento furiozis kaj kolosaj ondoj kvazaŭ ferocaj bestoj atakis la digon. La digo komencis disfali, kio minacis la muntadon de la subtera tubo. En tiu kriza momento laboristo Ĝang Minglong sin ĵetis en la riveron, spite al la danĝero, por ŝtopi la breĉon per sia korpo. Ankaŭ aliaj laboristoj sekvis lin, kaj konstruis dikajn murojn per pli ol 3,000 pajlaj sakoj plenigitaj de tero, tiel ke la digo estis firmigita kaj la muntado estis garantiita.

Sur la konstruejo, pli ol 20 unuoj samtempe faris konstruadon de centoj da laborobjektoj, el kiuj pluraj ĉefaj ofte iradis samtempe en alta rapideco. Por ke la unua generatora kompleto frue



*Laboristoj muntas turbinon.*

funkciu, la kadroj kaj laboristoj klopodis krei favorajn kondiĉojn por aliaj. En la dua tagdeko de majo 1972, la Ŝanhaja Sepa Konstrua Kompanio, kiu respondecis pri fosado de la bazo de la ĉefa fabrika domo, kaj la 301-a Konstrua Taĉmento, kiu respondecis pri muntado de subtera tubo de cirkula akvo longa je 1,200 metroj, estis en streĉa laborado. Tiuj du grandaj kaj urĝaj konstruaj laboroj samtempe iris sur malgranda tereno, kio kaŭzis al la laboristoj multan maloportunon. En tiu ŝlosila momento, la kamaradoj de la 301-a taĉmento diris firme: "Cedu la lokon al la frata unuo!" Kaj ili cedis la lokon al Konstrua Kompanio, malgraŭ tio ke ili havis virinojn multajn kaj kompare malnovajn ekipaĵojn. Poste ili kaptis ĉiun utiligeblan tempon por fari pli rapide la prokrastitan laboron kaj fine antaŭdate plenumis bonkvalite sian taskon.

Ankaŭ la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko, Ŝanhaja Turbina Fabriko kaj Ŝanhaja Generatora Fabriko, kiuj respondecis pri la konstruo de la ĉefaj partoj de la 125,000-kilovata turbina generatora kompleto, kondukis kunlaboron respektive en sia fabriko. En varmega julio, veldistoj de la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko alterne rampis en la vaporujon por veldado kaj tiel plenumis la taskon antaŭdate. La Ŝanhaja Elektro-maŝina Fabriko, kiu sin trovas apud la konstruejo kaj ricevis neniun taskon, iniciative riparis diversajn maŝinojn de la konstruejo kaj ricevis laŭdon de aliaj fabrikoj.

## SAĜO DE LA AMASOJ

Streĉe kaj glate iris la konstruado.

Kiam oni komencis enbati palisojn, aperis neatendita fenomeno: La enbatataj palisoj renkontis malmolan sablotavolon nepenetreblan. La palisenbatado estas bazo de la konstruo, kiu influas aliajn laborojn. Kiam la komanda grupo mobilizis la laboristojn prezenti metodojn kaj projektojn por solvi la problemon, iu kamarado rememoris pri palisenbatado en Fula-ergi de Nordorienta Ĉinio. Tiam oni ne povis enbati palison per 5-tuna martelo de 1-metra alteco, sed tion sukcesis per 3.5-tuna martelo post malalta kaj rapida enbatado. Kaj li rimarkis ke la grundtavolo ĉi tie multe similas al tiu de Fula-ergi. Sekve ili decidis provi tiun metodon kaj ricevis rimarkindan efikon. Kaj dank' al la saĝo de la amasoj, ili aplikis 7 proponojn pri preciza enstarigo kaj rapida kunigo de palisoj ktp, tiel ke la efiko de ramado estis altigita je 12-oblo.

La saĝo kaj forto de la amasoj donis profundan edukon al ĉiu membro de la komanda grupo de la konstruo. Ili ekkomprenis ke oni povas venki ĉian malfacilon, nur se oni plene fidas al kaj sin apogas sur la amasoj. La komanda grupo asignis al la 702-a Konstrua Taĉmento la taskon konstrui bazojn de turbino kaj generatoro kaj postulis, ke ĝi plenumu tiun unumonatan taskon en 20 tagoj.

Iuj kamaradoj laboris de la posttagmezo ĝis la noktomezo super projekto por aranĝi la laborojn kaj ili konkludis el tio ke oni neniel povos plenumi la taskon en 20 tagoj. Post kiam la komanda grupo klarigis al la amasoj la konstruan projekton kaj postulojn, laboristoj prezentis multajn proponojn por plibonigi laboraranĝon. Dank' al tio la laborperiodo estis mallongigita ĝis 18 tagoj kaj poste 16 tagoj, kaj fine ili plenumis la taskon nur per 10.5 tagoj.

Senfina estas la saĝo de la amasoj. La laboristoj kaj teknikaj laborantoj kreis kaj aplikis multajn novajn teknikojn kaj teknologiojn per kolektivaj saĝo kaj forto kaj tiel garantiis glatan iradon de la konstruo. Por konstrui fumtubon altan je 100 metroj, antaŭe oni bezonis almenaŭ 4 monatojn. Ĉifoje, laborantoj de la Elektro-projekta Instituto de Orienta Ĉinio kaj laboristoj de la 704-a Konstrua Taĉmento projektis kaj sukcese efektivigis novan teknologion, per kiu ili konstruis 100-metran fumtubon en 40 tagoj sen starigo de skafaldo kaj ŝparis grandan kvanton da ŝtalaj materialoj.

## POR ALTA RAPIDECO KAJ ALTA KVALITO

Klopodi por alta rapideco kaj alta kvalito fariĝis preskaŭ memkonscia ago de ĉiu sur la konstruejo. Muntisto Vang Ajing prezentis, post sia alveno

al la konstruejo, pli ol 200 raciigajn proponojn por altigi la kvaliton. Iufoje, kiam li muntis la turbinon, li trovis ke iu lagro-tenilo estis metita iom ne precize, kaj post dekoj da korektoj li fine eliminis la eraron. Por garanti la laboran kvaliton komunisto He Ginguj etendis vibratoron ĉien en la modelilo larĝa je 40 milimetroj kun armaturo, por ke la betona bazo de la turbino estu interne kompakta kaj ekstere glata.

Sub la direktado de veteranaj laboristoj, multaj junaj veldistoj diligente sin lertigis per ekzercado por altigi sian kapablon kaj garanti la laborkvaliton. Laŭ la postuloj de konstruo, la junaj veldistoj starigis diversajn benkojn por sin lertigi en malsamaj pozoj. Iu speco de alojtubo kun malgranda diametro kaj maldika muro estis malfacile veldebla. Iuj junuloj faris specialan benkon kaj sin ekzercis duon-monaton, kaj fine ili posedis la teknikon por veldi tian tubon. Dank' al ilia diligenta ekzercado, la kvalito de la veldaĵoj estis multe altigita kaj ne okazis akvoliko al la pli ol 6,900 altpremaj veldejoj de la kaldronego.

Dank' al tio, la laboristoj efike garantiis la kvaliton de la konstruo, sukcese finis la konstruan laboron de pligrandigo de la grandtipa elektrocentralo kaj ebligis al ĝia unua generatora kompleto produkti elektron post konstruado de malpli ol dek monatoj.

*La generatora kompleto komencas prove funkcii.*



# Artefarita lago apud Hiliaŭ-rivero

**E**N Tongliaŭ-gubernio de Gilin-provinco de nia lando estas Molimiaŭ-akvorezervujo kune konstruita de mongolaj kaj hanaj popolanoj. Post sia finkonstruiĝo tiu akvorezervujo ludas pli kaj pli grandan rolon en la loka konstruado.

## EFEKTIVIĜIS LA ESPERO DE MULTAJ JAROJ

Hiliaŭ-rivero trairas la mezan parton de Tongliaŭ-gubernio. En la pasinteco, dum pluva sezono la rivero ŝveliĝis kaj ofte kaŭzis inundon. En 1944, dekmiloj da muoj da herbejoj kaj kampoj estis inunditaj, kaj multaj homoj devis fuĝi el sia hejmloko kun siaj familianoj. Sed, kiam venis seka


sezono, la mongolaj kaj hanaj popolanoj tie loĝantaj ĉiam estis minacataj de trosekeco. Dum multaj jaroj ili deziris radikale jungi Hiliaŭ-riveron por elimini la katastrofojn. Tiu bela espero finfine efektiviĝis post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Post la Liberiĝo, la Partio kaj registaro metas grandan atenton sur la konstruadon de la nacimalplimultaj regionoj, kaj helpas la nacimalplimultojn en disvolvo de produkto kaj plibonigo de la vivo. Por jungi Hiliaŭ-riveron, la gubernia partia komitato decidis organizi enketan grupon sub la gvido de iu respondeca kadro por fari esploron pri tiu rivero. Iun tagon, la grupo trovis valon en dezerto ĉe la norda bordo de la rivero, kie dislokiĝas kelkdek malgrandaj akvujoj kaj grandaj sablamasoj. Ili

*Parto de Molimiaŭ-akvorezervujo*







*Kluzo sur la Ĉefa Irigacia Kanalo Hin-ajli de Molimiaŭ-akvorezervujo*


pensis: “La malutilo turniĝos en utilon, se ni forigos la sablamasojn, kunigos la akvujojn, starigos grandajn baraĵojn en ambaŭ finoj de la valo kaj tiel formos akvorezervujon, en kiun ni povos enkonduki akvon de Hiliaŭ-rivero.” Ĉiuj aprobis tiun ideon.

Informo pri konstruo de la akvorezervujo tuj disvastiĝis tra la tuta gubernio, kaj en kelkaj tagoj centoj post centoj da homoj sin anoncis por partopreni en la konstruado. En aprilo de 1958, armeo da homoj venis al la norda bordo de Hiliaŭ-rivero kun firma decido jungi ĝin.

La plejparto de Tongliaŭ-gubernio estas dezerto kaj ebenaĵo kaj en tiu gubernio troviĝas nek monto nek ŝtonoj, estas tre malfacile konstrui tie baraĵojn el sabloza tero. La valo ĝuste estas pasejo de vento, kaj ĉiutage flava sablo ŝvebas aere. Spite al sablovento oni tagnokte vektoportis sablon por konstrui baraĵon. Tamen, pli ol duono de la amasigita sablo tuj estis forportita de ventego. Kion fari do? Laboremaj kaj saĝaj mongolaj kaj hanaj popolanoj kreis metodon de akvumo kaj manramado: akvumi post meto de tridek-centimetra tavolo de sabloza tero kaj poste rami. Ili tiel laboris

naŭ tutajn monatojn, uzis pli ol 1.4 milionojn da labortagoj, movis pli ol tri milionojn da kubmetroj da sabloza tero kaj finfine konstruis en ambaŭ finoj de la valo du baraĵojn kun totala longeco de pli ol dek kilometroj. Sur la dezerta bordo de Hiliaŭ-rivero unuafoje konstruiĝis akvorezervujo.

Post finkonstruo de la akvorezervujo, en ĉiu printempo, somero kaj aŭtuno oni stikis salikobranĉojn sur la kontraŭ-akvaj deklivoj de la baraĵoj, kaj plantis arbojn kaj herbojn sur la suproj kaj dorsaj deklivoj de la baraĵoj. Post dekelkajara atentema flegado, nun sur la baraĵoj prospere kreskas arboj kaj herboj, kiuj ne nur protektas la baraĵojn kontraŭ ventego kaj ondegoj, sed ankaŭ solidigas ilin per sablo alportita de ventego kaj haltigita de radikoj de arboj kaj herboj. Tiu ĉi akvorezervujo povas ne nur dreni superakvon, sed ankaŭ konservi akvon por liveri al kampoj kaj herbejoj. Poste, ili ankaŭ fosis pli ol okdek trunkajn kaj branĉajn kanalojn, konstruis novan malgrandan akvorezervujon kaj per tio pligrandigis la akvorezervan kvanton kaj plivastigis la irigaciatan areon. Nun Hiliaŭ-rivero akvumas plantojn apud la bordoj kaj havigis al tiu loko riĉan rikolton en ĉiu jaro.



*Teknikistoj esploras kreskadon de fiŝoj el Jangzi-rivero.*

## DEZERTO FARIĜIS OAZO

En Tongliaŭ-gubernio troviĝas vasta dezerto, kies pliparto etendiĝas proksime de la okcidenta akvorezervujo. En la pasinteco, tie flava sablo kirliĝis en vento, kaj kreskis preskaŭ nenia vegetaĵo. Iu poeto iam priskribis tion jene: "Sur sablejo norde de la Granda Muro troviĝas familioj malmultaj, oni ne bredas silkraŭpojn nek kulturata kanabon. En cent-lia ĉirkaŭaĵo ne troviĝas pirarboj kaj jujubarboj, kaj en printempo ne vidiĝas persikaj kaj abrikotaj floroj."

Sed, post finkonstruo de la akvorezervujo tute noviĝis la fizionomio de tiu loko. Aperis oazoj sur la vasta sablejo en cirkonferenco de kelkcent lioj. Kanaloj irigacias nove formitajn rizkampojn, vicoj de protektaj forstozonoj kruciĝas unu kun alia kaj defendas plantaĵojn, kaj paŝtiĝas sur herbejoj gregoj de bovoj, ŝafoj kaj grasaj ĉevaloj. Dum la pasintaj dekkelkaj jaroj, oni ekspluatis pli ol dek ses mil muojn da rizkampoj utiligante la akvorezervujon, kaj ĉiu produkta brigado starigis fruktoĝardenon. La tieaj mongolaj kaj hanaj popolanoj jam povas manĝi mem produktitajn fruktojn. La ŝanĝiĝo de Hin-ajli-produktbrigado ja estas ekzemplo pri tio.

Tiu brigado situas ĉe la akvorezervujo. Antaŭ la Liberiĝo, tiu loko estis fama pro sablo-ventego kaj havis neniun herbejon por paŝtado. Paŝtistoj devis migri ĉiutage por serĉi oazon. La kelkcent

muoj da kampoj sur la sablejo ofte suferis de sekego kaj akvostagno kaj plantado ofte ne sciis rikolton kaj krome, kruela estis la ekspluatado de feŭdaj aristokratoj, tial paŝtistoj vivis ekstreme mizere kaj tie restis nur dekkelkaj familioj. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj la registaro la Hin-ajli-aj popolanoj kondukis batalon por venki venton kaj sablon. Precipe post la finkonstruo de la akvorezervujoj tie okazis grandega ŝanĝiĝo. Nun, utiligante la akvon de la akvorezervujoj tiu brigado formis pli ol 2,400 muojn da rizkampoj, 50 muojn da frukto-ĝardenoj kaj 50 muojn da fiŝbredejoj kaj forstumis kvar protektajn forstozonojn kaj sep kanalo-protektajn forstozonojn. Ĝia pomua produktokvanto de greno jam altiĝis de pli ol 50 kilogramoj en la pasinteco ĝis pli ol 190 kilogramoj. Ĉiujare ĝi vendas al la ŝtato ĉirkaŭ 300 tunojn da grenoj, kies plejparto estas rizo. Sekve de la disvolviĝo de produktado la komunumanoj vivas feliĉe kun sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj.

*Komunumanoj kolektas lotusfruktojn en la akvorezervujo.*



## JANGZI-RIVERAJ FIŜOJ NAĜAS EN LA LAGO

Ondetas la lazura akvo kaj naĝas fiŝaroj en la akvorezervujo. Malproksime kelkaj ŝipoj okupiĝas pri fiŝkaptado. La akvorezervujo produktas ne nur lokajn karpon kaj karason, sed ankaŭ blankan, nigran kaj herban karpajn devenintajn de Jangzi-rivero. Tiuj fiŝoj havas bonan famon pro sia bongusta viando kaj rapida kresko, tial oni bredas ilin grandnombre kaj produktas ĉiujare ĉirkaŭ naŭdek mil kilogramojn.


Por disvolvi bredadon de fiŝoj la administrantoj de la akvorezervujo laboris diligente kaj peneme. Ili fondis rasfiŝan stacion, kun basenoj por ellaso de ovoj kaj eloviĝo, eksperimentejo kaj pli ol 80 basenoj de fiŝ-specioj. En la lastaj kelkaj jaroj la produkto de fiŝidoj altiĝis jaron post jaro. En 1972, tie eloviĝis pli ol dekmilonoj da fiŝidoj de Jangzi-rivero, per kiuj oni ne nur kontentigis lokan

bezaron, sed ankaŭ helpis al aliaj unuoj.

Komence, la bredado de jangzi-riveraj fiŝoj en la sabla regiono en la nordo estis afero nefacila. Gvidate de la partia filio teknikistoj Ĝang Cunjoŭ kaj Ĝaŭ Songjan multe penis. En malsamaj sezonoj ili observis la vivon kaj maturiĝon de rasfiŝoj, kaj trovis, ke ili ellasas ovojn ordinaraj en la unua kaj dua tagdekoj de julio. Kaj ili ankaŭ alprenis rimedon por rapidigi la maturiĝon de fiŝoj, por plenumi la produktan taskon de fiŝidoj antaŭ la alveno de aŭtuno kaj havigi al la fiŝidoj la povon de sendependa vivo kaj eltenemo de frosto, tiel ke ili sukcesis vivigi pli ol 95 % de la fiŝidoj.

En la lastaj jaroj, jangzi-riveraj fiŝidoj elovigitaj de tiu ras-fiŝa stacio estas bredataj en la kelkdek akvorezervujoj, fiŝbredejoj kaj akvujoj sur Horĉin-stepo. Kaj la mongolaj, hanaj kaj alinaciecaj popolanoj loĝantaj sur tiu stepo nun jam povas havigi al si jangzi-riverajn fiŝojn.

*Forstozonoj en la kamparo sur la bordoj de la hodiaŭa Hiliaŭ-rivero*





MA VENĜANG:

## La konstruo de domoj de Ŝenjang

*La aŭtoro (la dua de maldekstre) sur konstruejo*

**L**A industria urbo Ŝenjang en nordorienta Ĉinio havas historion de pli ol mil tricent jaroj. Depost ĝia apero en Tang-dinastio, la problemo de loĝejoj de la laboranta popolo restis tute ignorata sub la malluma regado de feŭdaj dinastioj, reaciaj militaristoj, imperiismo kaj Kuo-mintango. Ĝis la liberiĝo de Ŝenjang en 1948, la

plankareo de la civilaj loĝdomoj de la tuta urbo estis nur 9,220,000 kvadrataj metroj, el kiuj la plejparto estis multjare neriparita. Post la Liberiĝo, la Komunista Partio kaj la popola registaro tre zorgas pri la vivo de la laborantaj popolanoj kaj konstruis civilajn loĝdomojn kun plankareo de 5,620,000 kvadrataj metroj en la pasintaj 23 jaroj.

*Nove konstruita etaĝdomo kun korea nacia karakterizaĵo*



Dank' al tio la loĝkondiĉoj de la laborantaj popolanoj estas plibonigitaj paŝon post paŝo kaj ankaŭ la urbo portas novan veston.

Jam dudek kvin jarojn mi okupiĝis pri projektado de domoj, persone travivis la ŝanĝon de la stato de loĝado de Ŝenjang kaj relative bone scias ankaŭ la loĝstaton antaŭ la Liberiĝo. En la malnova socio, same kiel aliaj urboj Ŝenjang estis paradizo de la burokratoj kaj tiranoj kaj infero de la laborantaj popolanoj. Kuomintangaj reakciuloj, en koluzio kun dom-luigistoj kaj tiranaj dommastroj, monopolis grandan nombron da civilaj loĝejoj kaj faris kruelan ekspluaton per alta luprezo. Laborantaj popolanoj loĝis en malhelaj, humidaj domaĉoj penetreblaj de vento, iuj el ili eĉ ne havis dormejon kaj nur povis tranokti en portalo aŭ sur perono de templo.

En 1948, Ŝenjang estis liberigita. Por plibonigi la loĝajn kondiĉojn de la laborantaj popolanoj, la Partio kaj la popola registaro senĉese konstruis novajn loĝdomojn. Laŭ la tuteca projekto de urbo-konstruado, oni laŭplane kaj laŭpaŝe konstruis novajn ampleksajn loĝkvartalojn kun racia dispozicio de diversaj konstruaĵoj por publikaj servoj kaj ĝenerale plantis arbojn ĉirkaŭ ili por kiel eble krei komfortan, higienan kaj kvietan medion por la laborantaj popolanoj. Mi persone partoprenis la

projekton kaj konstruadon de la Tiehi-a laborista kvartalo en la komenca periodo post la Liberiĝo. Tiam tie estis herboza sovaĝejo. Sed, ĝuste sur tiu dezertejo konstruiĝis pli ol 730 unu- kaj plur-etaĝaj brikaj domoj kun 630,000 kvadrataj metroj en kelkaj jaroj, kaj pli ol 89,000 laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj loĝiĝis en la novajn domojn kun radiatoroj, gasbekoj, akvokranoj, instalaĵo por forfluigi malpuran akvon kaj klozetoj. Oni konstruis tie ankaŭ kulturen palacon de laboristoj kiu povas enteni pli ol 4,000 personojn, laboristan stadionon kun 10,000 sidlokoj, ses mezlernejojn, dekojn da elementaj lernejoj, du hospitalojn, tri laboristajn sanatoriojn kaj unu parkon.

Laŭ la unueca plano de urbokonstruado, krom konstruado de novaj domoj, unuflanke oni riparitis malnovajn domojn, aliflanke grandaree malkonstruis kadukajn domojn kaj ĉeloke konstruis novajn unu- kaj plur-etaĝajn domojn, ekzemple en Bejŝiĉang, Ŝandongmiaŭ, Hita kaj aliaj sume 69 lokoj. Antaŭ la Liberiĝo, en Bejŝiĉang troviĝis trafikplena strato Ŝibaginglu, kie estis neniu etaĝa domo kaj la laborantaj popolanoj loĝis en ankoraŭ pli kadukaj domaĉoj. Post la Liberiĝo, oni malkonstruis ĉiujn tieajn kadukajn domojn kaj starigis 49 etaĝajn loĝdomojn kun plankareo de 53,000 kvadrataj metroj por enloĝigi 1450 familiojn, el

*La hodiaŭo kaj pasinteco de la strato Bejŝiĉang (la suba foto montras ĝian aspekton antaŭ la Liberiĝo)*




kiuj ĉiu okupas meznombre spacon de 36 kvadrataj metroj. Vang Ĝen, lavisto de Dengjingkjuanbanejo loĝis tie pli ol kvardek jarojn, antaŭ la Liberiĝo li kaj liaj kvar familianoj vivis en ĉambreto kun areo de malpli ol sep kvadrataj metroj kies monata luprezo estis tri juanoj kaj li devis doni donacon al la luiganto en gravaj festoj, kvankam li tiam enspezis nur dek-kelkajn juanojn ĉiumonate. Nun, li kaj liaj sep familianoj loĝas en du helaj kaj komfortaj apartamentoj kun areo de pli ol kvindek kvadrataj metroj. Li elspezis ĉiumonate lupagon de 7.55 juanoj, kiu okupas nur 2% de la enspezo de lia familio.

Ni projektas loĝdomojn laŭ principoj de ekonomieco, oportuneco, beleco kaj simpleco, laŭ la praktikaj bezonoj de la laborantaj popolanoj. En la jaro 1972, la urba registaro decidis konstrui etaĝdomon por koreaj loĝantoj en Juvenli-strato de la kvartalo "Paco". Mi partoprenis en la projekta laboro. Por adapti ĝin al bezonoj de la koreaj popolanoj, mi kaj aliaj teknikistoj plurfoje vizitis koreajn loĝantojn kaj kunsidis kun ili por peti iliajn opiniojn kaj koni iliajn kutimojn kaj morojn. En malpli ol tri monatoj, ni projektis kaj konstruis

la domon laŭ iliaj postuloj. Ĝi estas kvadrata trietaĝa domo kun galerioj larĝaj je 1.70 metroj kaj korto en la mezo. Ĉiu apartamento okupas spacon de pli ol 40 kvadrataj metroj, havas kuirejon kun granda forno kaj akvokonduka sistemo kaj klozeton kaj dormoĉambron kun ŝovpordo kaj hejtebla briklito. La ĉambroj estas helaj kaj higienaj.

Kun la disvolviĝo de niaj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la Partio kaj la popola registaro daŭre plibonigas la vivon de la laborantaj popolanoj. Post la Liberiĝo, la ŝtato kvarfoje reduktis la luprezon de loĝejoj, kaj nun la luprezo por ĉiu kvadrata metro de plankareo estas nur 0.13 juano. En la lastaj jaroj, la ŝtato asignis sumon post sumo da mono por konstrui novajn loĝejojn por popolamasoj. En la lasta jaro, Ŝenjang riparisis kaj konstruis 68 etaĝdomojn. Nun loĝdomoj kun plankareo de 750,000 kvadrataj metroj plejparte estas en konstruado. Ĉiufoje, kiam mi vidas nove leviĝintajn etaĝdomojn kaj ĝoje enloĝiĝintajn laborantajn popolanojn, mi profunde sentas: kiel feliĉe vivas niaj laborantaj popolanoj en la nova socialisma Ĉinio sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio!



## DU ŜOSEAJ PONTOJ EN SIĈUAN ESTIS MALFERMITAJ AL TRAFIKO

La du ŝoseaj pontoj Jibin kaj Leŝan super Mingiang-rivero de Siĉuan estas konstruitaj kaj funkciigataj antaŭnelonge.

Jibin-ponto longas 532 metrojn kaj altas 43 metrojn. Sur ĝia surfaco du kamionoj kaj unu ĉaro povas veturi unu apud alia kaj ambaŭflanke de ĝi estas trotuaroj du metrojn larĝaj respektive. Leŝan-ponto longas 501 metrojn, larĝas 12 metrojn kaj altas 27 metrojn. Tiuj du pontoj kunligas vastajn areojn ambaŭborde de Mingiang-rivero kaj ludas gravan rolon por akceli la interŝanĝon de materialoj inter kamparo kaj urboj en la socialisma konstruado.

## PLIPRODUKTO DE KOPTISO DE ŜIĜU

En la pasinta jaro, Ŝiĝu-gubernio kiu estas fama produktejo de koptiso de Siĉuan-provinco ricevis pliprodukton de tiu drogo. La kultura areo de koptiso de la tuta gubernio atingis 514 hektarojn, kun kresko de 59% kompare kun tiu antaŭ la kultura revolucio kaj la produktokvanto pliiĝis je okoblo.

Koptiso estas plurjara drogherbo, kiu povas esti uzata por kuraci furunkon, inflamon, vomadon ktp. Ŝiĝu-gubernio plantadas koptison de 400 jaroj. Krom specialaj kultivejoj de koptiso, ĉ. 500 produktaj grupoj de 38 komunumoj de la gubernio starigis specialajn kulturajn grupojn por disvolvi la produkton de tiu drogherbo laŭ la ebleco de lokaj kondiĉoj kaj per racia utiligo de la homfortoj kaj necesaj materialoj.

# La ĉina luktarto

**L**A ĉina luktarto, vaste ŝatata de la amasoj en Ĉinio, estas speco de sporto kun nacia aparteco.

Parto de ĝiaj ŝatantoj troviĝas en multaj fabrikoj, minejoj, komercaj entreprenoj, ŝtataj institucioj, lernejoj kaj armeaj trupoj en nia ĉefurbo. Ĉiumatene, ili faras ekzercadon sur placoj aŭ en parkoj. Kiam venas printempo, la nombro da homoj, kiuj ekzercas sin per *tajĝiĉjuan*, eĉ plimultiĝas.

La luktarto estas relative populara en la vilaĝoj de norda Ĉinio. Ni prenu Ĝangdanzi-brigadon de Fuĝuang-komunumo kiel ekzemplon. De la jaro 1957, 30 procentoj de la pli ol 500 loĝantoj de

la vilaĝo scipovas luktartan ekzercon kaj 70 procentoj de gejunuloj kaj geknaboj partoprenas en luktarta aktivado. La luktartaj ekzercoj estas farataj sen bataliloj aŭ kun bataliloj de pli ol dek specoj kiel ekzemple glavo, spado, bastono, lanco kaj vipo. Reprezentantoj de tiu brigado plurfoje partoprenis en luktartaj konkursoj de diversaj niveloj de la gubernia ĝis la provinca. La postlabora luktarta aktivado de la amasoj plibonigas ilian sanstaton kaj kontribuas por akceli la produktadon.

La ĉina luktarto ne postulas efektivan interluk-tadon kiel la nomo aludas, ĝi estas speco de sporto konsistanta el atakaj kaj defendaj movoj de la korpo kun aŭ sen uzo de batalilo, kunordigitaj en

*Gesportistoj de la naciecoj hano, hujo, jio, dajo kaj ĝaŭngo el diversaj lokoj de la tuta lando kolektiĝas por interŝanĝi spertojn kaj lerni unu de alia.*





tutajn seriojn. Ĉiuj movoj estas konformaj al la leĝoj de mekaniko kaj korpokulturaj bezonoj. Ĝi povas fortigi homojn korpe kaj spirite.

La riĉenhava ĉina luktarto povas dividiĝi en tri branĉojn nudmanan aŭ pugnan (*ĉjuan*), instrumentan kaj plurhoman kun helpaj ekzercoj. Sin trovas dekoj da specoj de *ĉjuan*-o inkluzive de *ĉangĉjuan*, *tajĝiĉjuan* kaj *ŝingjiĉjuan*. Tre variaj estas la bataliloj uzataj en luktarto. Oni ofte diras pri 18 specoj de bataliloj por aludi pri ilia multeco; ĝenerale ili estas dividitaj en tri kategorioj: longaj, mallongaj kaj flekseblaj.

La diversspecaj luktartoj ĉiuj kun sia karakterizaĵo kaj ekzercomaniero influas malsame al la homa korpo kaj havas malsaman kuracefikon. Ni prenu *ĉjuan*-an arton kiel ekzemplon: ĉiu *ĉjuan*-o konsistas el dekoj da pozoj kaj la ŝanĝiĝo de unu pozo al alia, inkluzivas movojn de la membroj laŭ certa maniero, ekvilibrigon, turniĝon de la korpo kaj eĉ saltojn aŭ transkapiĝojn. La *ĉangĉjuan* kun larĝaj kaj ritmaj movoj karakteriziĝas per forteco kaj eleganteco. Post fiziologia ekzameno, sciencaj laborantoj konstatis, ke *ĉangĉjuan* kaj *tajĝiĉjuan* bone efikas por plibonigi la fizikan kvaliton de homo kaj kuraci certajn kronikajn malsanojn.

*Ĉangĉjuan* estas ĉefa speco de ĉina luktarto. Ĝia bona plenumo postulas bonan fizikan kvaliton, sufiĉan fundamentan ekzercadon kaj striktan kunor-

digon de la movoj de la manoj, okuloj, korpo kaj kruroj. Ekzercado de *ĉangĉjuan* akcelas facilan kaj rapidan movon, eltenemon, elastecon, kapablon de salto, rapida reago kaj ekvilibro kaj bone influas al la spira, nerva kaj sangcirkula sistemoj. Ĝi estas sporto utila por disvolvi ĉiuflanke la fizikan kvaliton kaj kulturi kuraĝon kaj persistemon de homo. *Ĉangĉjuan* ĝenerale konvenas al gejunuloj.

*Tajĝiĉjuan* havas alian karakteron kaj estas taŭga por plibonigi la sanon de maljunuloj kaj suferantoj de certaj kronikaj malsanoj. Ĝi karakteriziĝas per mildeco, malrapideco, rondeco kaj senhaltita kontinueco de la movoj. Dum ekzercado de *tajĝiĉjuan*, oni devas koncentri la atenton, spiri nature, movi la membrojn kaj korpotrunkon samtempe kaj harmonie, alterne transmeti la pezpunkton de la korpo de unu flanko al alia por troviĝi ĉiam en stabileco, kaj moviĝi ĉiam kun egala rapideco kaj laŭ kurbaj linioj. Per *tajĝiĉjuan*, oni povas reguligi la funkcion de la cerbo, stimuli la funkcion de la hepato kaj la digesta sistemo, kaj akceli la cirkuladon de sango kaj limfo kaj metabolon.

En la luktarto kun instrumentoj, ankaŭ la spadarto tre bone efikas por fortigi homan sanon. La ekzercanto manipulas la spadon per la dekstra mano, movante la alian manon por ekvilibrigi kunorde kun la gamboj. Ĉiu speco de spadarto same



kiel *ĉjuan*-oj konsistas el dekoj da pozoj kun transiraj movoj. La spadarto karakteriziĝas per facilmoza gracieco kaj harmonia unuiĝo de elasteco kun firmeco, formantaj belajn pozojn. Per tia ekzerco oni povas disvolvi la lertecon, rapidecon kaj fortecon de korpomovoj.

La luktarto de Ĉinio havas longan historion. Ĝi estas kreita kaj disvolvita en la longa praktikado de batalo de la laboranta popolo. Sed antaŭ la Liberiĝo, la reakciaj regantaj klasoj de ĉiuj periodoj uzis ĝin por defendi sian reakcian regadon kaj subpremi la laborantan popolon. La vastaj amasoj de laboranta popolo tamen ĝin uzas kiel rimedon por fortigi sian korpon kaj plibonigi sian sanon.


Post la Liberiĝo, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro multe klopodis plibonigi la sanstaton de la popolo kaj energie subtenis la disvolvon de luktarto. Sub la direktado de la politikoj de la Partio: “preni la utilan esencon kaj forigi la rekrementon” kaj “disfloru cent floroj, elvolu novon forpuŝante malnovon”, la Komisiono de Korpokulturo kaj Sportoj de la Ĉina Popola Respubliko alte taksis la luktarton kaj ĝin disvastigis kiel oficialan sportobranĉon. Por altigi ĝian teknikan nivelon, la Komisiono de Korpokulturo kaj Sportoj kompilis lernolibrojn pri *tajĝi-ĉjuan*, *ĉangĉjuan*, luktarto per spado, glavo, lanco, bastono ktp. por havigi al la ŝatantoj de luktarto novajn enhavojn kaj metodojn de ekzercado.

La Tutlanda Prezenta Kunveno de Luktarto okazigita en Ginan de Ŝandong-provinco novembre de 1972 estis la plej grandioza kunveno de luktarto depost la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio. Inter la partoprenintaj sportistoj diversaciaj troviĝis grandaĝaj veteranoj kaj junaj debutantoj. Ili prezentis pli ol 1,350 diversajn programerojn kun alta lerteco kaj profunda ekzerciteco. La arto de iuj sportistoj, kiuj kuraĝe kreis novon kaj prezentis memelektitan luktarton kun bastono, lanco aŭ spado, atingis novan nivelon. Multaj junaj sportistoj montris sian apartan atingon en sia prezentado kombinante fortikecon kun elasteco en formado de belaj pozoj. La tuta programo de la luktarto trovis varman akcepton de la rigardantoj.

Sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, “Disvolu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo”, la sportoj de la nova Ĉinio vigele disvolviĝas. Ankaŭ la sporto de luktarto kun nacia formo disradiis freŝan vivforton kun la disvolviĝo de la tuta korpokultura afero.




*Ludo de halebardoj*



*Ludo de spado*



# Amikoj venas de malproksime



Ĉinaj kaj danaj

## ĈINA VOLANA TEAMO EN DANLANDO

En januaro, 1973, la Ĉina Volana Teamo vizitis Danlandon.

La volana sporto tre popularas en Danlando. De multaj jaroj ĝiaj sportistoj akiris relative bonajn rezultojn en internaciaj konkursoj. Danaj sportistoj tre ĝojis pro la vizito de ĉinaj sportistoj. Ili diris, ke plej grava estas ne la gajno aŭ perdo en la konkurso sed la pliantaŭenigo de amikeco kaj reciproka lernado pere de vizito. La saman volon esprimis ankaŭ ĉinaj sportistoj.

La unua amikeca maĉo inter sportistoj de Ĉinio kaj Danlando okazis en Kopenhago je la kvara de januaro. Danlandaj amikoj diris al ĉinaj gastoj, ke en Danlando estas senprecedence ke tiel multaj homoj kolektiĝis por spekti volanan konkurson. La maĉo iris streĉe kaj intense. La elstara ludarto de la dulandaj sportistoj forte interesis pli ol kvar mil spektantojn. En la halo jen regis silento, jen eksplodis tondra manklakado. La atmosfero fariĝis vigla kaj amika.

Jam longe ekzistas amikeco inter la volanistoj de Ĉinio kaj Danlando. En 1964 kaj 1966 ĉinaj kaj danaj volanaj teamoj jam interŝanĝis vizitojn.


En 1965, la Ĉina Volana Teamo vizitis Arhus, la duan grandan urbon en Danlando. En la volana halo de tiu urbo pendas ankaŭ nun granda foto de ĉina volanisto Tang Hianhu ludanta volanon. Danaj amikoj diris al siaj ĉinaj gastoj, ke lia vizito donis al ili profundan impreson. De tiam ili pendigis tiun foton sur la muro ĉe la enirejo de la volana halo, kiu ofte rememorigas al ili la ĉinajn sportistojn. Nun kiam ĉinaj sportistoj revenis inter ilin, ili tre ĝojiĝis.

Dana sportistino Karin Jorgensen kaj ĉina sportistino Ĉen Juniang interkoniĝis en 1965. Ili intime interparolis tuj ĉe renkontiĝo. Karin Jorgensen invitis ĉiujn sportistinojn de la ĉina teamo gastari en ŝia hejmo.

Dum la dekkelk-taga vizito, gastamaj danaj amikoj entuziasme aranĝis variajn aktivadojn por la ĉinaj gastoj venintaj de malproksime. Tiu vizito plue fortigis la amikecon inter la sportistoj de Ĉinio kaj Danlando.

## ĈINA VOLEJBALA TEAMO EN SVEDIO

Kiam la Ĉina Vira Volejbala Teamo vizitis Svedion en la lasta oktobro, la Sveda Volejbala



*Sportistoj en konkurso*




*Ĉinaj kaj danaj sportistinoj*

*Amika konkurso inter la ĉina kaj sveda volejbalaj teamoj*

Ligo faris zorgan kaj detalan aranĝon por la ĉinaj gastoj. Ĝia prezidanto Sinjoro Bengt Andersson akompanis la ĉinajn sportistojn en pluraj okazoj malgraŭ sia multokupateco. Kiam la ĉinaj gastoj vizitis lian hejmlokon Falkenkert, li, liaj edzino kaj infanoj estis atendantaj ilin en sia hejmo pretiginte lunĉon por ili. Tiuvespere kiam la maĉo finiĝis, li afable invitis la estron de la ĉina teamo al lia hejmo. En interparolo li diris, ke estas tute erare ke la Internacia Volejbala Ligo esceptas Ĉinion kaj tiu situacio nepre devas ŝanĝiĝi. La Ĉina Volejbala Teamo esprimis koran dankon al la sveda amiko pro lia justa starpunkto.

La gastama sveda popolo montris profundan amikecon al la ĉina popolo per diversaj manieroj. Kiam la sportistoj de la du landoj konkuris en Uppsala, iuj membroj de la Sveda-Ĉina Amikeca Asocio tien venis por spektado, alte tenante rubandon kun jena surskribo en la ĉina kaj sveda lingvoj: "Vivu la amikeco inter la sveda kaj ĉina popoloj!" Ili ankaŭ distribuis flugfoliojn prilaŭdantajn la sportan principon de la ĉinaj sportistoj "unue amikeco, due konkurso". Post la finiĝo de la maĉo, tiuj amikoj entuziasme skribis gratulajn leterojn al ĉinaj sportistoj kaj venis por esti fotitaj kune kun ili. En sia vizito al Vingaker ĉinaj sportistoj



renkontiĝis kun maljunulo kun aĝo de pli ol 60 jaroj veninta de alia loko speciale por rigardi la konkurson kaj bonvenigi ĉinajn gastojn. Ekster la sporta halo li distribuis flugfoliojn por propagandi sveda-ĉinan amikecon. Li diris al la ĉinaj gastoj, ke ili estas preparantaj malgrandan bildan ekspozicion pri Ĉinio.

Dum sia vizito pli ol unu-semajna, la ĉinaj sportistoj estis varme gastigitaj de la aŭtoritatoj de ĉiu urbo kaj urbeto kien ili iris. En Uppsala, vicprezidanto de la urba komitato Sinjoro Drok-bsson, gvidis svedajn amikojn kanti ĉe bankedo svedajn popolkantojn por la ĉinaj gastoj. Ĉe la bankedo okazigita de la prezidanto de la urba komitato de Vingaker la helpantoj portis nacian kostumon kaj malgranda orkestro ludis belajn popolajn muzikojn. Tie regis ĝoja atmosfero, kaj la gastoj kaj gastigantoj enprofundiĝis en amikecon inter la popoloj de Svedio kaj Ĉinio.

### ĈINA GLACIHOKEA TEAMO EN SVISIO

Kun volo lerni de aliaj la Ĉina Glacihokea Teamo por la unua fojo vizitis Svision, kie tre viglas vintra glacihokea ludo.

Kvin amikecaj maĉoj inter la Ĉina Glacihokea Teamo kaj la Ŝtata Junulara Glacihokea Teamo kaj Ŝtata Knaba Glacihokea Teamo de Svisio okazis en kvin kantonoj de Svisio. Ĉu en la fame konata Ĝenevo, ĉu en malproksima Sieere, ĉinaj sportistoj estis afable akceptitaj de lokaj registaraj oficistoj kaj sportistoj de Svisio. La gastigantoj diris, ke ili estas amikaj senditoj de la ĉina popolo.

Sieere estas malgranda gubernio en Valais-kantono. La respondeculo de tiu gubernio diris ĉe la akcepto en "fortikaĵo de Sieere", "Sieere — la suna urbo en Svisio — bonvenigas vin per sunbrilo kaj amikeco!" Ili alpinglis al la ĉinaj sportistoj orbrilajn medalojn de la "Suna Urbo" simbolantajn Sieere.

Vespere en Sieere kiam okazis la maĉo, nombro da junaj spektantoj, portantaj rubandon kun skribo "Ĉinio, marŝu antaŭen", ĉiam kuraĝigis la ĉinajn sportistojn, ĉar ili informiĝis de la ĵurnalo, ke en la unuaj du maĉoj la ĉina teamo estis malantaŭ la svisa teamo laŭ poentoj. Ili ankaŭ kunportis faman vinon de Valais-kantono por regali ĉinajn amikojn. Post la maĉo, parto de la spektatoroj amase sekvis la ĉinajn sportistojn ĝis ilia hotelo.

*Entuziasmaj spektantoj*



*La glacihokeaj*





*Ĉinaj kaj svedaj sportistoj ĝoje intervidiĝas sub la slogano "Vivu la amikeco inter la popoloj de Svedio kaj Ĉinio".*


Dum sia vizitado la ĉinaj sportistoj formis profundan amikecon kun la svisaj sportistoj kaj popoloj. La patrino de svisa glacihokea sportisto Mario ne nur rigardis en Ĝenevo la maĉon kun la ĉina teamo kiun partoprenis ŝia filo, sed ankaŭ speciale veturis al Sierre por spekto. Hazarde


Mario vundiĝis je gambo dum tiu taga maĉo, tamen ŝi ne maltrankviliĝis, sed senĉese mankladis por la ĉina teamo. Ŝi diris: "En Ĝenevo mi vidis vian stilon. Mia filo Mario tre amas vin. Kiel bone estus, se vi bonvolus gastigi en mia hejmo!"

Dieter, estro de la Ŝtata Junulara Glacihokea Teamo de Svisio kaj liaj du fratoj ĉiuj estas glacihokeaj sportistoj. Ĉe iu maĉo, la gepatroj de Dieter kun granda ekscito intervidiĝis kun ĉinaj sportistoj. Lia patro diris, ke ne gravas, se estas lingva baro, ĉar oni povas interkompreniĝi per gestoj.

En la tempo de la vizito, svisaj ĵurnaloj entuziasme laŭdis spiriton kaj stilon de la Ĉina Glacihokea Teamo.

*Teamoj de Ĉinio kaj Svisio en konkurso*





*Ĉinaj kaj japanaj aktoroj kune ludas la baledon Ruĝa Virina Taĉmento en Pekino.*

## Nova floro de amikeco kaj arto

de ĜONG JIJOŬ

**L**A geamikoj de la Japana Macujama Baleda Trupo refoje venis al nia ĉefurbo Pekino en januaro de la kuranta jaro kunportante profundan amikecon de la japana popolo. Dum sia vizitado en Ĉinio, la japanaj artistoj provludis la ĉinan revolucion modernan baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*. Ŝimizu Masao, estro de la baleda trupo, diris al ni, ke *Ruĝa Virina Taĉmento* estos oficiale prezentata en Tokio en majo de la kuranta jaro, laŭ la postulo de la vastaj japanaj popolamasoj, por rememorigi la 31-an datrevenon de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kaj festi la 25-an datrevenon de la fondiĝo de Macujama Baleda Trupo.

Macujama Baleda Trupo estas fame konata kiel unu el la progresintaj artaj rondoj de Japanio. Post sia fondiĝo en la jaro 1948, tiu ĉi baleda trupo starigis sian celon, sub la gvido de ĝia estro Ŝimizu


Masao kaj vicestrino Macujama Mikiko, “krei revolucion kaj nacian baledon de la japana popolo”. Ili estas lertaj en kunigado de la karakterizaĵoj de baledo kun la superaj kvalitoj de la japanaj tradiciaj literaturo kaj arto kaj, post senĉesa praktikado, ili kreis multajn verkojn plenajn de moderna revolucia sento en nacia formo de Japanio. De la jaro 1955, ili kreis kaj prezentis serion da bonaj programoj kiaj *Gion-festo*, *Kvin Okinavaj Kna-binoj*, *Japana Tamburo*, *Vjetnama Junulino* k.a. Tiuj verkoj kun naciaj karakterizaĵoj de Japanio, kiuj spegulas batalan vivon de la popolo kaj kuraĝigas ĝian batalvolon, trovis varman bonvenigon kaj aplaŭdon ĉe la japanaj laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj aliaj popolamasoj.

La revoluciaj artistoj de Macujama Baleda Trupo vivas en la popolamasoj kaj elĉerpas nutraĵojn el ilia batalado, tiel ke ili ricevis varman subtenon de la lastaj. Kaj ili kaŭzis malkontenton

kaj malamon al la reakciaj fortoj en Japanio pro iliaj elstaraj kontribuoj en disvolvo de baleda arto kun naciaj karakterizaĵoj de Japanio. Tamen, ili ĉiam persiste batalas kaj senĉese progresas timante nenian persekuton kaj rompante pezan sieĝon de la reakcia kulturo. Nun krom la ĉefa trupo kaj Macujama Baleda Lernejo en Tokio, la trupo starigis en aliaj japanaj grandaj urboj ankaŭ siajn filiojn, institutojn kaj kursojn por kulturaj junaj aktoroj. Ni ĝoje vidis, ke pli firmaj fariĝis ĝiaj veteranaj artistoj en batalado, kaj sane kreskas aro post aro la junaj aktoroj.

Dum la lastaj jaroj, Macujama Baleda Trupo faris aktivajn kontribuojn ankaŭ por disvolvi la amikecon kaj kulturen interŝanĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio. Frue en la jaro 1955, Macujama Mikiko, fame konata japana artistino, jam adaptis la ĉinan operon *Blankhara Knabino* en samnoman baledon por surscenigi ĝin laŭ la postulo de la vastaj popolamasoj de Japanio, skribante novan paĝon en la historio de amikeco kaj kultura interŝanĝo inter ambaŭ landoj. De la jaro 1958, la artistoj de la trupo trifoje vizitis nian landon, donis al la ĉina popolo bonan impreson kaj ricevis varman bonvenigon de la ĉinaj spektantoj.

Kiam niaj delegacioj vizitis Japanion, ni ankaŭ ricevis varman akcepton de Macujama Baleda Trupo. Aparte neforgeseblaj estis tiuj tagoj kiam la Ŝanhaja Baleda Trupo de Ĉinio vizitis Japanion kaj faris prezentadon. Tio estis la longa deziro de la geamikoj de Macujama Baleda Trupo, kaj por tio ili faris longdaŭran bataladon. Kiam



*Macujama Mikiko ludas la rolon de Blankhara Knabino en la samnoma revolucia baleto.*

la Ŝanhaja Baleda Trupo faris unuan publikan prezenton en Japanio, la estro de Macujama Baleda Trupo Ŝimizu Masao kaj lia edzino kaj victrupestrino Macujama Mikiko ĝoje venis al la teatro, kaj kiam leviĝis la kurteno kaj aperis Hi-er sur



*Ĉina artisto varme gratulas trupestroon Ŝimizu Masao pro la sukcesa prezentado de Macujama Baleda Trupo.*

la scenejo, ili ne povis deteni siajn larmojn kaj diris emocie: “Finfine realiĝis nia longa deziro.” Dum la tuta periodo de la vizitado de la Ŝanhaja Baleda Trupo en Japanio, ĉiuj membroj de Macujama Baleda Trupo faris akceptan laboron per ĉiuj fortoj forgesante eĉ dormon kaj manĝon. La hejmoj de Ŝimizu kaj Macujama fariĝis ekzercejoj por la ĉinaj geaktoroj. En ĉiu prezento, S-ro Ŝimizu ordonis sian solan filon Ŝimizu Tecutaro kaj alian ĉefan aktoron Tanaka Toŝijuki ke ili ĉiam staru ĉe ambaŭ flankoj de la scenejo por preventi eventualan incidenton. S-ro Ŝimizu ripetade diris al sia filo: “Nepre protektu la prezenton de la ĉina baleda trupo, eĉ se vi devos oferi vian vivon.” Tiu subluma spirito forte kortuŝis ĉiun membron de la Ŝanhaja Baleda Trupo!

Ekfloris nun alia amikeca floro. Ĉifoje, kiam S-ro Ŝimizu kaj aliaj artistoj de la baleda trupo venis al Ĉinio por provludi la baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*, la aktoroj de la Ĉina Baleda Trupo multe kortuŝiĝis kaj ricevis grandan kuraĝigon.

Ĝiaj sep geaktoroj jam kapablis fari la dancmovojn de preskaŭ 200 roloj de la tuta baledo post

ĉirkaŭ unumonata diligenta ekzerco. Aktoro Ŝimizu Tecutaro sola posedis la dancmovojn de pli ol dek roloj inkluzive de tiuj de Hong Ĉangking, Hiaŭ Pang, Laŭ Si k.a. Moriŝita Joko, kiu ludas la rolon de Vu Kinghua, metis sin mem antaŭ rigora postulo kaj zorgeme penis trovi ĉion rebonigeblan en siaj dancmovoĵ dum la provludo. Tonosaki Jaŝiaki, veterana aktoro de la trupo, sindediĉeme esploris kune kun la ĉina aktoro Liu Kingtang kiel bone ludi la rolon de heroo Hong Ĉangking, eĉ post la fino de la plej lasta provludo. Por pli bone provludi la baledon, la aktoroj de Macujama Baleda Trupo ne nur rigore atente plilertigis sin dum ekzercado de dancmovoĵ, sed ankaŭ multe strebis por akiri konon pri la ĉefa ideo de la baledo kaj la historia fono de la tiama ĉina revolucia batalo.


Vespere de la 10-a de februaro, la macujama kaj ĉina baledaj trupoj kune faris sukcesan prezentadon kaj kunlabore modlis la figurojn de la herooĵ de la baledo. Apenaŭ finiĝis la prezento, la aktoroj de ambaŭ landoj jam ĉirkaŭbrakumis kaj forte manpremis unuj aliajn eĉ ne ŝanĝinte la vestojn. La aktoroj de la Ĉina Baleda Trupo esprimis profundajn dankojn al la japanaj amikoj, kaj laŭdis

#### *Ĉinaj kaj japanaj artistoj*





Ĉinaj kaj japanaj ak-  
toroj kune provludas  
la revolucion moder-  
nan baledon Ruĝa Vi-  
rina Taĉmento.



ke ili faris novajn kontribuojn por plifortigi la ami-  
kecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.


Por gratuli ilian venontan prezentadon de *Ruĝa  
Virina Taĉmento* en Japanio, Guo Moĵuo, vicpre-  
zidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda  
Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la  
Ĉina-Japana Amikeca Asocio donacis al la japanaj  
amikoj jenan poemon, kiam ili restis en Ĉinio:

*La floroj de l'arboj heroaj\* ruĝiĝas ja kvazaŭ  
fajreroj,*

*Virinoj kapablas subteni duonon de l' blua ĉielo.  
Por ke ĉiulandaj popoloj ekvivu en plena libero,  
La bravaj martiroj batalis sentime eĉ al vivofero.*

Lasu la artan floron kune akvumitan de la popo-  
loj kaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ĉinio kaj  
Japanio flori ankoraŭ pli bele sur la japana scenejo.

\* *Heroa arbo estas bombako* (Bombax, arbo kun  
palmataj folioj kaj fruktoj enhavantaj semojn ordinare  
kotonecajn).



**“KOLEKTO DE RAPORTAĴOJ EL  
KAMBOĜO” KAJ “KOLEKTO DE  
NOVELOJ DE LAOSO” ESTAS  
ELDONITAJ EN NIA LANDO**

La Popola Literatura Eldonejo de nia  
lando lastatempe eldonis *Kolekton de  
Raportaĵoj el Kamboĝo* kaj *Kolekton de  
Noveloj de Laoso*.

La *Kolekto de Raportaĵoj el Kamboĝo*  
konsistas el 34 raportoj skribitaj de patrio-  
taj ĵurnalistoj de la Nacia Unueca Fronto  
de Kamboĝo. Ĝi raportas grandan nom-

bron da eminentaj personoj kaj batalaj  
aferoj en la kontraŭusona naciŝava milito  
de Kamboĝo kaj spegulas heroismon kaj  
batalspiriton de la kamboĝa popolo.

La *Kolekto de Noveloj de Laoso* kun 16  
verkoj de naŭ laosaj aŭtoroj estas elektitaj  
el diversaj kolektoj de rakontoj eldonitaj  
de Eldonejo de la Laosa Patriota Fronto  
kaj Literatura kaj Arta Eldonejo de Vjet-  
nama Armeo. La verkojn skribis verkis-  
toj, ĵurnalistoj kaj soldatoj. Per siaj  
propraj travivaĵoj, ili vive raportis la  
batalan vivon de la diversnaciecaj popo-  
lanoj de Laoso, spegulas grandan venkon  
de la popola milito gvidata de la Laosa  
Patriota Fronto kaj malkaŝis la agresan  
krimagon de la usona imperiismo.



*Guo Moĵuo, Liaŭ Ĉengĝi, Hu Juĝi k.a. kun  
la Delegacio de Japanaj Kulturaj Rondoĵoj*

## **Guo Moĵuo, Liaŭ Ĉengĝi kaj Hu Juĝi donis bankedon en honoro al delegacio de japanaj kulturaj rondoĵoj**

Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio, Liaŭ Ĉengĝi, prezidanto de la asocio, kaj Hu Juĝi, membro de la Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso, donis bankedon, vespere de la 5-a de marto, en honoro al la Delegacio de Japanaj Kulturaj Rondoĵoj kun Zenmaro Toki kiel ĝia estro, Jasuzi Toita kiel vicestro kaj Norio Ŝirato kiel ĝenerala sekretario.

Membroj de la delegacio ĉeestantaj la bankedon estis: Masato Ide, Rokuro Tokuda, Hisamaro Komacu, Utiharumi Seto, Nobuaki Tanaka, Hiroŝi Ŝino kaj Nobujuki Hara.

Ĉeestis ankaŭ Jang Gi, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Eksterlando, gvidantaj membroj de ĉinaj koncernaj departementoj kaj personoj de kulturaj rondoĵoj Sun Pinghua, Je Lajŝi, Li Gi, Haŭĵan, Li Fude kaj Vej Gianje.


Farante toston Guo Moĵuo diris: “Kvankam 88-jaraĝa, Zenmaro Toki, estro de la delegacio, malgraŭ lacigo de vojaĝo, venis al Ĉinio por antaŭenigi la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio kaj kulturen interŝanĝon inter la du landoj. Ni tutkore estimas lin.” Li esprimis la esperon, ke tiu amikeco sur nova bazo disvolviĝos por eterne, kaj ke kulturaj rondoĵoj de la du landoj pluaparte pliigos siajn interŝanĝojn, interlernos unuj de la aliaj, kuraĝigos unuj la aliajn kaj kune progresos por fari ankoraŭ pli novajn kaj grandajn kontribuojn por la kulturo de la homaro.

Tostante, Zenmaro Toki, estro de la delegacio, diris: “Nia vizito al serio da lokoj en Pekino ebligis al ni vidi nunan staton de Ĉinio kaj ĝian progreson. Post reveno al Japanio, ni konigos al multaj homoj ĉirkaŭ ni niajn impresojn pri Ĉinio por pliprofundigi la kulturen interfluon inter la du landoj.”

Guo Moĵuo vizitis Zenmaro Toki en la gastejo antaŭ la bankedo. Zenmaro Toki esprimis siajn dankojn por tio.

# Ŝosea Reto de

# Junnan



Serpentumanta ŝoseo sur monto

Junnan-provinco situas ĉe la sudokcidenta limo de nia lando kaj el ĝia teritorio 90 procentoj estas montregiono. La interplektitaj montĉenoj estas tranĉataj de muĝantaj riveroj formante multajn naturajn barojn. En historia literaturo oni priskribis la trafikadon de Junnan per jenaj vortoj: “Tra altaj danĝeraj montoj kaj ravinoj zigzagas vojetoj kun cent turniĝoj” kaj “la krutajn montvojetojn ne povas trairi eĉ ĉevaloj”. Antaŭ la Liberigo nur malpli ol triono de ĝiaj gubernioj estis atingeblaj per aŭto kaj la diversnaciaj popolanoj en tiu provinco multe suferis de la trafika malfacilo.


Post la Liberigo, kuraĝigate de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**klopodu konstrui vojojn spite al malfaciloj, por helpi la fratajn naciojn**”, la vastaj amasoj de vojkonstruaj laboristoj kaj diversnaciaj popolanoj komencis heroan batalon kontraŭ la naturo, hakante montojn, kaj konstruis centojn da pontoj kaj multajn ŝoseojn. Kun la formiĝo de ŝosea reto en la tuta provinco, rapide ŝanĝiĝis la postiĝinteco de ĝia ŝosea trafiko. Antaŭ la Liberigo en la tuta provinco estis nur iom pli ol 2,700 kilometroj da ŝoseo, sur kiu povas veturi aŭtoj, sed nun ĝia longeco atingis pli ol 33,900 kilometrojn, tiel ke ĉiuj gubernioj jam estas interligitaj per aŭtovojo. Karavanoj da kamionoj senĉese transportas grandan kvanton da agrikulturaj maŝinoj, insekticido, kemia sterko kaj vivbezonaĵoj en la montregionon kaj transportas el ĝi agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn kaj industriajn materialojn. La disvolviĝo de la konstruado de ŝoseoj forte akcelas la interŝanĝon de produktaĵoj en la tuta provinco kaj la disvolviĝon de la industria kaj agrikultura produkto.


Fotoj de nia fotisto




Pasaĝeroj survoje

Aŭtostacio en montregiono





Šoseo en montregiono



Pendponto

Nova ŝoseo en konstruado





# Burĝono

de HAŬĴAN

## Noto pri la aŭtoro:

Haŭĵan naskiĝis en kamparana familio de Hebej-provinco en la jaro 1932. Inter liaj ĉefaj verkoj troviĝas la kolektoj de noveloj *Feliĉaj Birdoj sur Branĉoj*, *Nova Printempo*, *Vilaĝo de Abrikotaj Floroj*, *Koloraj Nuboj* kaj *Rakontoj pri la Maljuna Sekretario* kaj la romano *Sunbrilaj Tagoj*. En 1972, eldoniĝis la unua parto de lia nova romano *Orebrila Vojo*, kaj nun li estas verkanta ĝian duan parton. Dume li verkis ankaŭ novelojn spegulantajn la novajn aferojn aperintajn de post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj *Burĝono* estas unu el ili.



**M**I atendis kamaradon Ma laŭ interkonsento ĉe aŭtohaltejo en kamparo de Gihian-gubernio.

Estis frua printempo. La tero estis varmiĝanta kaj la branĉetoj de salikoj reverdiĝis. Vigle laboris la komunumanoj sin okupantaj pri konstruado de irigacia kanalo, transportado de sterko aŭ ebenigo de kampoj. El la homamaso, kiu fosis puton sude de la ŝoseo, venis viro en militista uniformo — jen ĝuste kamarado Ma.

“Mi alvenis ĉi tien antaŭ preskaŭ unu horo,” li klarigis proksimiĝinte al mi. “La knabo eklaboris iom rigardinte kaj ankaŭ mi iris tien kaj lin sekvis. Ni devas peni energie por ne esti post-

lasita de la nova generacio!” Tion dirinte, li ekkriis al la putokonstruejo: “Kihin, tuj venu kaj salutu onklon Liang!”

“Jes, mi venas!” iu respondis tie kaj tuj el la homamaso elsaltis knabo en roza sportista pulovero, simile al flagranta flamo. Li estis 12- aŭ 13-jara, kun svelta, alta staturo, granda kapo, nigra hararo kaj brilaj okuloj. Li viŝis la ŝviton sur sia frunto per la manplato, prenis bluan vatitan jakon de sur teraltaĵo kaj ĝin metis sub la akselon, kaj ankaŭ prenis peltan ĉapon kun grandaj orelŝirmiloj, ĝin metis sur la kapon kaj venis al ni ridetante.

“Tiu ĉi knabo nomiĝas Kihin,” Maĉjo prezentis lin al mi, “li estas la unua filo de mia pliaĝa frato

kaj sturmuleto de nia Doŭtianling. Ha, eble li ankoraŭ ne naskiĝis, kiam vi estis en nia vilaĝo....”

“Vi mismemoras,” mi diris aŭdinte liajn vortojn kaj tuj ekmemorinte la pasintaĵon, “mi venis al vi ĝuste kiam li naskiĝis. Tiutage vi diskutis pri starigo de la popola komunumo. Ni kunvenis en la okcidenta ĉambro, dum li kriegis en la orienta....”

Ambaŭ Maĉjo kaj mi ekridegis.

Kihin tre embarasiĝis de tio. Li tamen nek ruĝiĝis pro honto, nek sin deturnis, sed mordis la lipon kun serioza mieno kaj fikse rigardis nin per siaj brilaj nigraj okuloj.

Lia konduto memorigis al mi respektindan kaj amindan bazan kadron, nome la patron de la knabo Ma Liangi. Iuj diris en tiu jaro, ke “la vilaĝo situanta norde de la antikva Granda Muro, kiu troviĝis en la senhoma regiono dum la Kontraŭ-japana Rezistmilito, havas nur malfekundajn kampojn kaj malriĉajn loĝantojn kaj estas preferinde malkonstrui la domojn kaj ilin translokigi al ebenaĵo ĉe la montopiedo.” Ma Liangi firme oponis kontraŭ tiu ideo. “Ni certe ne eraros,” li diris, “se ni agos laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Ni lernu de la montotranslokiga Malsaĝa Avo, persiste klopodu de generacio al generacio kaj ni certe ĝisfunde ŝanĝos la aspekton de la malriĉa montvilaĝo!” ... La knabo antaŭ mi tre similis al li en fizionomio kaj agmaniero.

“Nun li estas lernanto,” Maĉjo daŭrigis sian prezentadon de la nevo al mi, “kaj samtempe ankaŭ malgranda komunumano. Ekde la granda antaŭensalto, la popolanoj de Doŭtianling penlaboradis dum dekelkaj vintroj kaj printempoj kaj transformis la 32 ŝtonajn valojn en ŝtuparajn kampojn, per konstruo de baraĵoj. En la kuranta jaro ni komencis reformi la lastan valon. Iutage, kiam la knabo laboris en la valo kune kun aliaj komunumanoj, ŝtono ruliĝis de montotalio al ili. Por savi aliajn, la knabo vundiĝis je sia kruro....”

Kihin denove mordis sian lipon kaj montris seriozan mienon, kaj samtempe mangestis por ĉesigi la parolon de lia onklo.

“Bone,” diris Maĉjo kun rideto, “ni ne parolu pri la meritoj. Ostokuracisto el nia armeo resanigis lian kruron. Vi kunportu lin al la gubernia urbo kaj poste konduku lin al la stacio de longdistancaj aŭtobusoj por veturi norden de la Granda Muro.”

Mi ĝoje akceptis la komision.

Ĉar Maĉjo devis partopreni en kunveno, li reiris al la kazino kaj ambaŭ mi kaj Kihin atendis la aŭtobuson ĉe la haltejo. La knabo ankoraŭ pensadis kun intereso pri la putofosantoj, fikse rigardis al ili momenton kaj diris al si mem: “Kiel grandaj estas la parceloj ĉi tie!”

Mi diris al li, ke nature estas pli multe da kampoj ĉi tie ol en la valo.

Li sin turnis al mi kaj ekparolis al mi unuafoje: “Ne, ne. La totala areo de la kampoj formitaj en la valoj certe estas ne malpli granda ol ĉi tie. Kaj cetere, ĉi tie ne estas tiel multaj arboj, birdoj kaj drogherboj kiel ĉe ni.... Vere bona estas nia montregiono!” Li ekridis brue kaj rigardis malproksimen starante sur la piedpinto kaj diris: “Kial la aŭto ankoraŭ ne alvenas?”

Mi demandis lin, ĉu li sopiras al la hejmo.

Ĉi-foje la knabo konfesis, ke jes, kaj poste li tamen sin pravigis per aro da kaŭzoj: “Jam tutan semajnon mi forestis de la lernejo; la frue matura kotono-plantido en nia florpoto jam devas esti sunumita....”

Mi pensis, ke li ja ankoraŭ estas infano, kaj mi devas trovi ian manĝaĵon por lin distri. Mi do malfermis mian mansakon kaj elprenis per ambaŭ manoj kvanton da ruĝaj jujuboj.

Li senceremonie akceptis kaj metis ilin en sian poŝon. Poste li elprenis unu, ĝin metis en la buŝon kaj diris ekmordinte ĝin: “Vere dolĉa!” Kaj post refoja mordo li admiris: “He, kie kreskas tia jujubo kun tiel malgranda kerno?”

Mi konigis al li, ke ĝi estas speciala produktaĵo de Gisu-vilaĝo en tiu ĉi loko.

La knabo ŝanĝis sian mienon, ĵetis envian rigardon al mi kaj poste demandis montrante la vilaĝon ĉe la piedo de la norda monto: “Ĉu tiu vilaĝo? Oĉjo ĵus diris al mi, ke ĝi estas Gisu-vilaĝo, li tamen ne diris al mi, ke ĝi havas tian jujubarbon.”

Post iom da tempo, finfine alvenis la atendita malhele verda aŭtobuso.

Kiam mi ascendis la aŭtobuson, Kihin tamen sin turnis post mian dorson, puŝis min en la veturilon kaj diris serioze: “Onklo Liang, vi forveturu nun, ĉar mi ankoraŭ devas ion fari ĉi tie kaj ne forveturos hodiaŭ.” Tion dirinte, li sin turnis kaj ekkuregis. Li saltis de sur la ŝoseo, transpasis



irigacian kanaleton kaj haltis nur post suriro al betona kluzpordo. Li deprenis sian ĉapon kaj alte ĝin svingadis al mi: “Ĝis revido, onklo Liang, ĝis revido!”

Lia subita faro vere metis min en dilemon: estis malkvietige kaj maldece forveturi postlasante la knabon; kaj tamen neblis kuratingi lin de la aŭtobuso, ĉar li jam kuris sufiĉe malproksimen.... Fermiĝis la pordo de la veturilo, ekbruis la motoro kaj la radoj de la veturilo levis polvan nebulon. Gapante al la ĉiam pli foriĝanta roza punkto, mi sentis kaj maltrankvilon kaj koleron.

Atinginte la gastejon de Huajĵoŭ, mi tuj telefonis al Maĉjo en la gubernia urbo de Gihian kaj li diris al mi, ke Kihin ne venis al li. En la sekvanta tago, subite ŝanĝiĝis la vetero kaj printempa pluvo komencis gutadi.

Starante sub la tegmentrando, mi meditis maltrankvile kaj ne sciis kion fari.

“Onklo Liang!” subite aŭdiĝis klara krio ĉe la pordego kaj tuj poste Kihin galopis al mi.

Liaj vestoj tute malsekiĝis, liaj haroj gluiĝis al la kaphaŭto pro pluvakvo, lia vizaĝo parte ruĝiĝis kaj parte blankiĝis pro frostoj kaj li firme tenis sian peltan ĉapon en la sino.

Kiam mi ĉiamaniere klopodis trovi Kihin, mi pensis kun nesubigebla kolero, ke mi senkompatate verŝos mian koleron sur lin, post kiam mi trovos lin. Sed nun, kiam la knabo kvazaŭ falinta el la ĉielo jam staris antaŭ mi, mi tamen senkoleriĝis malgraŭvole.

Li iris kun mi en la domon, zorgeme metis la peltan ĉapon al la plej interna parto de la lito, ĝin ĉirkaŭŝirmis per kapkusenoj kaj subite ekridis brue kaj diris: “Onklo Liang, vere bona estas la vilaĝo Gisu, kie vi loĝis!”

“Ĉu vi iris al ĝi?” mi demandis kun miro.

Li balancis la kapon petoleme kaj daŭrigis: “Vere multe da grandaj jujubarboj troviĝas tie, la montodeklivoj kaj kampoj estas plenaj de ili. Iuj dikas kiel bovlo, aliaj kiel homa talio kaj ankoraŭ aliaj estas tiel dikaj, ke mi ne povas ilin ĉirkaŭbraki....”

Mi demandis lin, kial li iris al la vilaĝo.

Anstataŭ respondi, li prenis de sur la lito sian grandan peltan ĉapon kaj ĝin svingetante montris al mi: “Jen al vi, kio estas tio ĉi!”

Mi alĵetis atentan rigardon kaj trovis, ke en la ĉapo estas fasko da purpuraj jujubarbaj ŝosoj. Kun tuŝita koro kaj brilaj okuloj mi ekkriis mire: jen estas la kaŭzo de la tuta afero!

“En nia vasta montareo,” li diris tre kontente, “estas multaj deklivoj kaj valoj kaj ĉie kreskas acidjujubarboj. Mia patro diris, ke la monto fariĝos trezorejo, se oni turnos la acidjujubarbojn per greftado en jujubarbojn! Ĉiuj plenaĝuloj kaj infanoj tie estas serĉantaj bonajn speciojn kaj elektantaj bonajn ŝosojn por kulturi bonajn jujubarbojn.”

Mi intence diris ŝerce: “Tre vasta estas via loko, kiel la malmultaj ŝosoj povas kontentigi la bezonon?”

Li metis la ĉapon kun ŝosoj sur siajn krurojn kaj kalkulis serioze per siaj fortaj malgrandaj fingroj: “Jen estas 30 pecoj por grefti 30 arbojn, kaj se oni en la venonta jaro greftos per tiuj arboj po 10 arbojn, tiam estos 300 arboj....” Li kalkulis kaj kalkulis kaj subite diris al mi kontente: “Diru, kiom da arboj oni povos grefti per la tricent arboj en la jaro post la venonta? Kiom oni povos grefti, kiam mi fariĝos tiom aĝa kiom mia patro? Ho, multege!”

La braveco kaj fervoreco de Kihin montris lin tre simila al lia patro kaj la kamparanoj en la montregiono. Verdire, mi ekamis la knabon.

La printempa pluvo estis ne intensa kaj tamen faladis senĉese.

La knabo jen premis sian vizaĝon al la fenestro kaj rigardis eksteren, jen kuris al la pordo kaj eltendis sian maneton por kolekti pluvakvon. Kolektinte iom da akvo, li ĝin forĵetis, denove kolektis iom kaj denove ĝin forĵetis. “Onklo Liang, ĉu aŭto povas veturi sur la ŝoseo en pluva tago?”

Mi diris al li, ke la vojo estas pavimita per gruzoj kaj iom da pluvo ne povas tion malhelpi.

“Kaj se pluvegas?” li demandis denove.

Mi diris, ke la vojo estas traveturebla tuj post pluvego.

“Kaj se pluvos senĉese?” li demandis denove.

Mi diris al li, ke ni havas tie manĝaĵon kaj loĝejon kaj li povas restudi siajn lernitajn lecionojn, do ne bezonas domaĝi prokraston por du aŭ tri tagoj.



“Kion fari pri la ŝosoj?” li demandis malĝoje, “vi ja scias ke mi havas ŝosojn.”

Denove mi ekridis pro lia seriozeco. Li tamen longe ne parolis kun mi pro nekontenteco.

En la sekvanta tago, li trifoje urĝis min por telefoni al la stacio kaj detale demandi, kiam nor-den veturos aŭtobuso. Krom daŭre premi sian vizaĝon al la fenestro aŭ kolekti pluvakvon ĉe la pordo, li foje kaj refoje zorgeme malfermis la ĉapon kaj atente kontrolis la ŝosojn, sidante sur la lito. “La ŝosoj certe timas froston?” li demandis kun kapo klinita.

Mi tuj diris komplezeme, ke ili estas difekteblaj de frosto.

“Kaj ili sekiĝos pro longa tenado, ĉu ne?” li demandis denove.

Mi refoje donis jesan respondon al li.

“Ĉu oni povas ilin aspergi per akvo?” li redemandis.

Ĉifoje mi vere ne kuraĝis diri mian opinion.

“Certe ne,” li mem respondis al si, vidante ke mi silentis, “se oni aspergus kaj la akvo glaciĝus, tiam la ŝosoj certe pereus!”

Tagmeze, kiam mi iris al la manĝejo por elpreni manĝon, li volis helpi min porti almanĝaĵon. Reveninte al nia ĉambro kun la manĝaĵo, mi metis ĝin sur la tablon sed li ne revenis post longa atendo. Mi do reiris al la manĝejo por lin serĉi. Elirinte el la ĉambro mi tuj vidis, ke li kaŭrante en la budo ekster la kuirejo kun du teleroj da almanĝaĵo en la manoj rigardadis kuiriston kiu senŝeligis rafanojn. Mi vokis lin plurfoje, kaj nur tiam li aŭdis min kaj poste malrapide stariĝis kaj iris kun mi en la ĉambron.

Subite min kaptis maltrankviliga penso: se tio longe daŭros, ĉu la serioza kaj obstina knabo ne malsaniĝos pro zorgo? Mi do provis trankviligi lin kaj firme diris al li, ke mi certe alportos duoble tiom da ŝosoj al Doŭtianling, se tiuj burĝonoj ne estos sukcese greftitaj pro tempoperdo survoja.

Aŭdinte miajn vortojn, li diris flegme: “Jam forpasos la tempo por greftado, kiam vi revenos.”

Mi formetis la manĝilaron, balais la plankon kaj tiam rimarkis, ke Kihin denove malaperis. Mi serĉis lin en la kuirejo kaj la ripozejo de la servistoj, tamen ne trovis lin. Iu servisto diris, ke li vidis antaŭ nelonge, ke li iris el la pordego kun pajla sako sur la kapo. Mi pensis, ke li eble iris al la stacio por informiĝi pri aŭtobuso kaj iris tien por lin serĉi. Ĉar ĉesis la trafiko, neniu troviĝis ĉe la stacio. Tiam mi ankoraŭ pli maltrankviliĝis, timante ke la memdecidema kaj kuraĝa knabo denove faris ion neatenditan.

Mi revenis al la gastejo kaj kiam mi metis la manon sur la pordoanson por malfermi, la servisto rapidis al mi kaj sciigis malbonan novaĵon, ke pro alteco kaj malvarmeo norde de la Granda Muro, glaciigis pluvakvo kaj la aŭtobusoj devis ĉesi veturi por 4-5 tagoj. Mia koro peziĝis, sed malferminte la pordon mi sentis ke brilo aperis antaŭ miaj okuloj.

Sidante ĉe la litrando, li estis tranĉanta rafanojn. Li detranĉis la supron de unu rafano, ĝin metis sur la tablon, prenis alian rafanon de sur la planko, fortranĉis la radiketojn kiel antaŭe kaj poste detranĉis la supron. Li laboris tre serioze kun mieno tiel trankvila kaj senĝena....

Mi demandis lin, ĉu li aĉetis la rafanojn surstrate.

“De la legomvendejo”, li diris, “ili estas ĵus prenitaj el la kelo”.

Mi demandis lin, ĉu li povos forkonsumi tiel multe da rafanoj.

Li rigardis min kun flankenklinita kapo kaj diris mistere: “Vi scios poste.”

Vidante ke li fariĝis tiel gaja, mi do ne ĝenis lin kaj min apogante sur la falditan litkovrilon eklegis la *Pekinan Ĵurnalon*. “Onklo Liang,” Kihin subite vokis min, kiam mi estis absorbita per la legado, “vidu, ĉu tia aranĝo taŭgas?”

Mi turnis la kapon kaj trovis, ke li tenas ambaŭmane tranĉitan rafanon, ĉe kies supro eniĝis 6-7 jujubarbaj ŝosoj, simile al sagoj en sagujo. Mi unue miris, poste ekĝojis pro la surprizo, kaj min ĵetis al la knabo kun neregebla ekscitiĝo kaj firme lin ĉirkaŭprenis.

Klopodante sin liberigi el mia brakumo, li aprezis sian “ŝosujon” kaj diris: “En tia konservejo ili certe ne sekiĝos nek frostiĝos, ĉu ne?”

La saĝeco kaj cerbumemo de Kihin ankoraŭ pli similas al tiu de lia patro Ma Liangi. Kaj nun, mi sentis koran estimon al tiu ĉi kamparana filo kaj malgranda komunumano.

Tiunokte li dormis tre dolĉe. Dufoje mi ŝaltis la lampon por vidi lin, kaj li ne vekigis. Mi trankviliĝis kaj dolĉe dormis ĝis oni puŝe vekis min.

“Onklo Liang, mi foriros.”

Mi malfermis la okulojn kaj vidis, ke lampo brilas en la ĉambro, sed ekstere ankoraŭ estas peĉe mallume; Kihin jam surmetis siajn vestojn kun leda zono ĉirkaŭ sia talio kaj tenas ĉe sia brusto kvar rafanojn en la pelta ĉapo.

Mi rapide leviĝis kaj diris al li, ke li ne bezonas rapidi, ĉar rimedo por protekti la burĝonojn jam estas trovita kaj rekomenciĝos la trafiko eble post unu aŭ du tagoj.

Li forte skuis sian kapon kaj diris firmdecide: “Ankoraŭ atendi? Tion mi ne povas kaj la ŝosoj ne eltenos tion. Mi piediros al la hejmo!”

Mi diris, ke la distanco tro longas, la vetero estas malbona kaj piedirado malfacila.

“Kiam mia patro estis en mia aĝo,” li diris, “li laboris kiel malgranda dungito por bienulo. Tiam li devis fari ir-reiron al la urbo dum unu tago portante objektojn surŝultre; ĉu mi tamen ne povas piediri en servo al socialismo?”

Lia diro decidema kaj forta ekbruligis mian kordon kiel fajro. Mi haste surmetis la vestojn, elliĝis kaj diris: “Mi iros kune kun vi al Doŭtianling!”

Li ĵetis rigardon al mi kaj ekridis brue.

Kiam ni ekmarŝis renkonte al la aŭroro, mi sentis en la koro heroan poezion, rigardante al la altaj pintoj de Janŝan-montaro kaj la majestatan Grandan Muron en malproksimo. Nature mi ekmemoris la vortojn de mia malnova kunbatalanto Ma Liangi: “Ni lernu de la montotranslokiga Malsaĝa Avo, persiste klopodu de generacio al generacio kaj ni certe ĝisfunde ŝanĝos la aspekton de la malriĉa montvilaĝo!”

Ĉu la knabo rapide marŝanta apud mi, tiu ĉi burĝono kriegante alveninta al tiu ĉi mondo kune kun la popola komunumo, ne estas ĝuste reprezentanto de la nova generacio? En la longa kaj malfacila batalado aperos generacio post generacio da novaj homoj simile al buntaj floroj, kaj nia lando prosperados por eterne.

Ho, kiel bela estas nia vivo!



## Ji-nacio



*Ji-nacia komunumanino*

**J**I-nacio kun pli ol 3,200,000 anoj estas unu el la relative grandaj nacimalplimulto de nia lando. Ĝiaj membroj disloĝas en la provincoj Siĉuan, Junnan, Gujĝoŭ kaj Guanghi. La ji-nacianoj ekspluatis la sudokcidentan limregionon kune kun aliaj nacianoj, kreis sian brilan nacian kulturon kaj per tio faris por nia granda patrolando gravan kontribuon.

### PRI DISVOLVIĜO DE JI-NACIO

Laŭ historia literaturo kaj elterigitaj historiaj restaĵoj ji-nacio travivis tre longan periodon de ŝtonepoka primitiva socio. Dum la periodo de la 3-a ĝis la 2-a jarcento a. K. ji-nacio jam finis sian primitivan socion kaj iris en la klasan socion. Je la lasta duono de la 13-a jarcento p. K. aperis feŭda socio en ĝiaj multaj regionoj escepte de Liangŝan-montaro kie ankoraŭ regis sklavposeda sistemo.

En longdaŭra produkta kaj klasa batalo la ji-nacianoj kreis sian brilan nacian kulturon. Ili ne nur kreis sian skriban lingvon kaj kalendaron sed ankaŭ akumulis riĉajn sciojn pri farado de medikamentoj per diversaj vegetaĵoj, animaloj kaj mineraloj. La medikamento "Bajjaŭ de Junnan" fame konata en- kaj ekster-lande estas sukcese kreita

ĝuste de ji-naciano kun familia nomo Kju de Gingdong, laŭ esotera recepto.

La ji-nacia literaturo havas plej klaran nacian stilon. Ĝis nun ankoraŭ konserviĝas multaj belaj kaj kortuŝaj epopeoj, eposoj kaj popolkantoj. La eposo *Aŝma* kiu profunde malkovras krimojn de la feŭdaj regantoj estas la plej fame konata. Ankaŭ ĝiaj muziko, pentrarto kaj skulptado atingis grandajn sukcesojn.

Ĉiuj ji-nacianoj estas lertaj en kantado kaj danado. Iliaj fortaj dancmovoj kutime estas akompanataj de bela muziko kun drasta ritmo de fluto kaj pluka kordinstrumento. La 24-a de la sesa monato de ĝia lun-kalendaro en ĉiu jaro estas la solena Torĉofesto de ji-nacianoj. Tiukaze, ĉiuj familioj ĝoje celebras la feston kun brulantaj torĉoj, regalas unuj la aliajn per festeno kaj sin amuzas per rajdkonkurso, sagpafado, luktado, trapezludo ktp.

Sed antaŭ la Liberiĝo, la kulturo kaj arto de ji-nacio estis serioze detruita kaj ili reakiris novan vivon nur post la Liberiĝo.

### KRUELA SKLAVPOSEDA SISTEMO

Sub la kruela nacia subpremo kaj klasa ekspluato la socio de ji-nacio stagnis longtempe kaj la

## REVOLUCIAJ FAJREROJ NEESTINGEBLAJ

Kie ekzistas subpremo tie leviĝas kontraŭstaro.

La historio de la ji-a popolo estas historio plena je bataloj kontraŭ la klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj. Iliaj batalaj flamoj neniam estingiĝis. La insurekcio de kamparanoj de Ajlaŭ-monto komen- cita en 1956 daŭris dudek jarojn kaj donis pezan baton al la regantoj de King-dinastio kaj la sklavaj mastroj. La batalo de ji-nacianoj leviĝinta en 1912 en Vuding kaj Huangōu kontraŭ la lokaj registaraj oficistoj daŭris 26 jarojn. Dum la periodo de 1914-1916 ji-naciaj sklavoj en Liangŝan-montaro faris grandskalan organizitan ribelon, kiu forte batis la kriman regadon de la mastroj. Kaj nur pro limigo de tiamaj historiaj kondiĉoj tiuj bataloj malsukcesis.

Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio la revolucia batalo de la ji-aj popolanoj iris en novan etapon. En 1935, dum la Longa Marŝo, kiam la Ruĝa Armeo pasis tra la regiono de ji-nacio, fondiĝis soveta reĝimo en Mianhian-gubernio. Sub la helpo de la Partio, la ji-aj popolanoj starigis "Ji-nacian Gugi-taĉmenton de Ruĝa Armeo", dank' al kies helpo la Ruĝa Armeo glate trapasis la regionon de ji-nacio kaj samtempe nemalmultaj

sklavposeda sistemo en la regiono de Liangŝan- montaro en Siĉuan ankoraŭ konserviĝis eĉ antaŭ- vespere de la Liberiĝo. En tia socio sin trovis kvar klasoj: La unua, "Nuo", t.e. nigraj ji-nacianoj, sklavmastroj, kiuj konsistigis nur sep procentojn de la tuta loĝantaro, posedis ne nur la plejparton de la tero sed ankaŭ la disponan rajton de la aliaj tri klasoj en malsamaj gradoj. La dua, "Ĉjunuo", la plej alta inter la subpremataj klasoj, kies membroj okupis 50 procentojn de la tuta loĝantaro, loĝis en la administra regiono de la mastroj sen libereco de transloĝiĝo. Ĉiujare ili devis fari senpage difinitan nombron da tagoj da laboro por la mastroj kaj akcepti ilian uzuradon. La tria, "Atuaĝia" estis slavo, kiuj konsistigis trionon de la membroj de la tuta nacio. Ili devis servi al la mastroj dum la tuta vivo kaj geedziĝi laŭ ilia volo. La kvara, "Ŝiaŝiŝialuo", estis sklavoj de la plej malalta soci- pozicio, kiuj okupis dek procentojn de la tuta loĝan- taro. Ili estis rigardataj de la mastroj kiel "parol- povaj brutoj" kaj devis porti sur si ĉenon dum plenumo de plej peza fizika laboro kaj "lignajn ŝuojn" pezajn je 20-30 kilogramoj dum dormo pro tio ke la mastro timis ke ili forfuĝos. Ili estis ofte mortigitaj pro manko de singardemo aŭ ia ajn kon- traŭago. En la sklava socio la vivo de la sklavoj estis ekstreme tragika.

*Maljuna kamparano de Nongzuo-komunumo de Mejgu-gubernio de la Liangŝan-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Siĉuan-provinco faras klasan edukadon al Gejunuloj per ĉeno uzita de sklavposedanto por kateni sklavon.*



ji-aj junuloj aniĝis al la Ruĝa Armeo kaj marŝis al la norda parto de Ŝenhi-provinco.

Dum la Liberiga Milito, la ji-aj popolanoj en la provincoj Junnan, Siĉuan kaj Gujĝoŭ vaste disvolvis partizanan militon kaj kreis partizanan brigadon de ĈPLA en la limregiono de Junnan, Guanghi kaj Gujĝoŭ. Ili donis fortan baton al la kuomintangaj reakciuloj kaj venigis la aŭroron de la liberiĝo.

## SUR LA VOJO DE SOCIALISMO

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, sinsekve fondiĝis tri ji-naciaj aŭtonomaj subprovincoj de Liangŝan-montaro, Ĉuhjong kaj Honghe kaj kvin ji-naciaj aŭtonomaj gubernioj de E-ŝan, Lunan, Ninglang kaj aliaj. Post tio, en mallonga tempo de kelkaj jaroj la ji-nacianoj jam plenumis la demokratian reformon kaj detruis la feŭdan bienulan ekonomion kaj sklavposedan sistemon. Tuj poste ili venke kondukis la socialismanrevolucion kaj efektivigis popolkomunumigon en la kamparo.

Sub la prudenta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la liberigitaj ji-nacianoj gajnis grandan sukceson ankaŭ en la socialisma konstruado. Antaŭ la Liberiĝo ĝia agrikulturo estis tre postĝinta kaj la pomua produktokvanto estis tre malgranda. En la jaro 1971, la produktokvanto de greno de la tuta Aŭtonoma Subprovinco de Liangŝan-montaro kreskis 1.7-oble kompare kun tiu de 1952 post ĝia fondiĝo. Kaj en 1972 denove akiriĝis bona rikolto. Antaŭ la Liberiĝo,

la regiono havis nek industrion nek aŭtovojon. Nun ĉiu el ĝiaj gubernioj jam havas aŭtovojon, rapide stariĝis fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj, kemisterko, cemento, fero, ŝtalo kaj karbo kaj aliaj entreprenoj, kaj krome konstruiĝis ankaŭ pli ol 480 hidroelektraj stacioj grandaj kaj malgrandaj. Gegiu estas ĉefurbo de la Hani-nacia kaj Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Honghe, kiu minekspluatadis de kelkcent jaroj per tre postĝinta produkta metodo kaj malnovaj ekipaĵoj, nun jam fariĝis nova industria urbo kun industrio de metalurgio, maŝinoj, aŭto, kemiaĵoj, fajencaĵoj, teksado kaj aliaj.


Antaŭ la Liberiĝo neniu kuracisto troviĝis en la regiono de Liangŝan-montaro escepte de la lokoj en Junnan dense loĝataj de ji-nacianoj kun malmultaj popolaj kuracistoj. Hodiaŭ ĉiu gubernio jam havas hospitalon, ĉiu distrikto kuracan stacion, ĉiu komunumo kuracejon kaj ĉiu produkta brigado sian sanitarejon de koopera kuraco kun siaj kamparanaj kuracistoj. La ŝtato tre zorgas pri la medicina kaj higiena afero de Liangŝan-montaro kaj sendis tien sole en la lastaj du jaroj pli ol 600 diplomitojn el la medicinaj universitatoj kaj institutoj de Ŝanhajo, Pekino kaj Ĉongking. Post la granda kultura revolucio la nombro de la diverspecaj lernejoj jam atingis pli ol 2,300 en la Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Liangŝan-montaro.

Sub direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj en solida unuiĝo kun la popolanoj de aliaj frataj nacioj la ji-aj popolanoj faros novan kontribuon al la socialisma konstruado de la sudokcidenta parto de nia patrolando.



*Vang Fenglan (meze), kadrino de Ŝilin-komunumo de la Lunan-a Ji-nacia Aŭtonoma Gubernio de Junnan, laboras kune kun komunumanoj.*

# Galopanta ĉevalo el bronzo



*Bronza galopanta ĉevalo*

LA bronza galopanta ĉevalo el Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.) elterigita en Lejtaj de gubernio Vuvej, Gansu-provinco, en la Granda Proletara Kultura Revolucio estas kultura objekto kun granda valoro.

Vuvej estis unu el la kvar prefektuoj starigita okcidente de la Flava Rivero en Han-dinastio (206 a.K. -220 p.K.). La starigo de tiuj prefektuoj plisekurigis la Riverokcidentan Koridoron kaj ebligis glatan trafikon de la "Silka Vojo", kiu garantiis la amikajn rilatojn kaj kulturajn interŝanĝojn inter Ĉinio kaj okcidenta Azio kaj Eŭropo. Post la fondo de tiuj prefektuoj, Vu-di, imperiestro de Han-dinastio, reganta dum 140-87 a.K., konstruigis novan muregon, kiu etendiĝis okcidenten de la Granda Muro de Kin-dinastio en Longhi. Laŭ la Granda Muro estis konstruitaj fortikaĵetoj po 5 lioj (1 lio = duona km.), kaj brulsignalejoj po 10 lioj, en kiuj estis gvatistoj, kiuj alarmis per fumo dum tago kaj per fajro dum nokto en okazo de malamikaj invadoj. Tamen en okazo de sablovento, pluvego aŭ neĝado, la brulsignalo ne povis funkcii, tiam oni devis trovi por tio alian rimedon. Ĉe tia okazo rapidaj ĉevaloj estis bezonataj, sur kiuj rajdis bravaj kurieroj por porti informon al post-fronto. Pri tio la poeto Vang Vej en la oka j.c. iam priskribis jene:

*Ŝanĝiĝas po dek lioj la ĉevalo,  
Kvin liojn ĝi trapasas kun vipfalo.  
Alarmo venas de la fronto nun:*

*Giukjuan-on la nomadoj jam sieĝas.  
Ĉesas leviĝi la alarma fum',  
Ĉar sur pasejoj, montoj dense neĝas.*

El tiuj versoj oni povas facile vidi la gravecon de bonaj ĉevaloj en antikveco. La tri mil "sangŝvitaj ĉevaloj" el Davan, historie fame konataj kiel "Ĉielaj Ĉevaloj", estis venigitaj de imperiestro Vu-di en 104 a.K. post grandaj penadoj trans Tarim-dezerto kaj la montoj Congling. Tiuj ĉevaloj estis priskribitaj tiaj, ke iliaj malmolaj hufoj faras spurojn sur ŝtono per frapoj dum galopado kaj ties ŝvito ĉe la ŝultroj havas koloron ruĝan kiel sango.

La historiistoj tiel priskribis la devenon kaj karakterojn de tiuj "Ĉielaj Ĉevaloj" kaj la poetoj prikantis iliajn rapidecon kaj gravan utilon. Estas malfacila tasko por belartistoj figuri ilin kiuj galopas tiel rapide kvazaŭ flugante en la aero. Hju Bejhong, la fama pentristo de ĉevaloj en Ĉinio, skizis en sia vivo milojn da ĉevaloj, tamen li konfesis ke li ankoraŭ ne sukcesis pentri galopantan ĉevalon, kiu povas kontentigi lin mem.

La bronza ĉevalo elterigita en Lejtaj altas 34 cm. kaj longas 45 cm. Ĝi estas majstraĵo de iu nekonata artisto el Orienta Han-dinastio, kiu kreis ĝin per sia alta saĝo, profunda vivsperto kaj riĉa belarta lingvo, koncize kaj fortoplene, tiel ke la artaĵo posedas plene la strebatan karakteron de nia belarta tradicio: "viveco kaj perfekteco ambaŭ en la formo kaj spirito, viveco de la etoso, kun

mirinde aranĝita formo kaj plene elmontrita forti-keco". Per lerta kaj alta tekniko, la artisto kunfandis la fortecon kaj rapidecon de la galopanta ĉevalo en vivplenan etoson, kiu en sia kompleteco verŝiĝas en la levitan kapon, la fortikan korpon kun fluliniaj konturoj kaj en la kvar saltantajn hufojn. La artisto certe havis longan sperton pri la karaktero kaj vivo de rapidkura ĉevalo, tiel ke li povis formi tian ĉevalkapon henantan kun spirito senrivala, kaj la fino de ties harligaĵo ĉe la kolo flulinie direktas al la vosto de la kvazaŭ fluganta ĉevalo. La kompono de la ĉevalo prezentas harmonian tuton, kiu igas nin senti ion nevideblan fulmorapide kunportantan antaŭen la galopantan ĉevalon. Dank' al la viveca formiĝo, tiu senmova objekto tamen estigas en nia penso la realecon de la legendo pri la ĉevaloj, kiuj kuris mil liojn en unu tago kiel priskribita en "Kanto pri Ĉielaj Ĉevaloj" notita en la historia libro *Han Ŝu* verkita antaŭ ĉ. 1,900 jaroj.

La artisto krome — mi volus diri — "metis" malpeze sur la dorson de fluganta hirundo la kvaran piedon de la ĉevalo galopanta en la aero. Mi ne uzas la vorton "treti", ĉar kiel ni povas vidi ke la rilato inter la hufo kaj la hirundo ne estas "treto", nome la koncerna dekstra posta kruro estas ĝuste en la momento, kiam ĝi estas retirata antaŭen

aŭ en la momento kiam la kvar kruroj troviĝas en la aero dum galopado. Ĝi ne "tretas" la hirundon kaj tial ne donas senton de malstabilo. La sagaco de la artisto troviĝas en tio ke li elektis tiun plej karakterizan pozicion de galopanta ĉevalo por sukcese krei perfektan figuron de "Ĉiela Ĉevalo kuranta en la aero", kunigantan la rapidecon kun ekvilibro. Tio estas kombino de la idealo kun la realo. Kaj la plialteco de la kreado de la artisto super la realaĵo troviĝas ankaŭ en la priskribo de la interrilato de la hufo kun la hirundo.

Tiu nova elfosita "bronza galopanta ĉevalo" plie konvinkas nin pri la vereco de la eldiro de Prezidanto Maŭ: "Ne povas esti kono aparta de praktiko" kaj tiel pli profunde komprenigas al mi ke estas ne ebla ankaŭ artkreado apartigita for de la vivo. Ne estas imageble ke la kreinto de la artaĵo povus kondensi ĉiujn trajtojn de galopanta ĉevalo en perfektan artaĵon, kiu devenas de la vivo sed pli alta ol la vivo mem, sen longdaŭra observado kaj persona sperto en la vivo, sen profunda analizo kaj studado.

La trovo de tiu kreaĵo de metiarta majstro el feŭdisma socio donas novan valoraĵon al la trezoro de niaj naciaj belartaj heredaĵoj kaj ankaŭ ŝancon al niaj hodiaŭaj belartistoj kritike heredi la historian tradicion, lerni kaj plialtigi sian artistan kapablon.



## Reĝo Li Ĉuang

de ŜIJAŬ

*Preparu bovaĵon, ŝafaĵon kaj moston!*

*En urbon la Reĝon Li Ĉuang bonvenigu!*


*Nur tiam ni abolicios impostojn.*

Tio estis laŭdkanto de la popolanoj al la kamparana insurekcia armeo, gvidata de la Reĝo Li Ĉuang — Li Ziĉeng, en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) de Ĉinio. La insurekcio eksplodis en la norda parto de Ŝenhi-provinco en la jaro 1628.

En la lastaj jaroj de Ming-dinastio, sub la ekstreme kruela feŭda regado, altrangulaj aristokratoj, burokratoj kaj egbienuloj okupis centojn, milojn

kaj eĉ dekmilojn da hektaroj da kampoj, la regantoj fojerefoje ekspluatis la popolon per impostoj por militaj celoj kun pretekstoj defendi sian landon kontraŭ invado de aliaj nacioj kaj subpremi "enlandajn ribelojn", kaj krome okazis tiam sinsekve katastrofoj de inundo, sekeco, insektoj malutilaj al grenplantoj kaj epidemio. Ĉio ĉi tio dronigis la popolanojn en profundan mizeron. Precipe kamparanoj en la norda parto de Ŝenhi-provinco, kie okazis serioza sekeco senprecedenca dum cent jaroj, suferis pli grandan mizeron. Por sinsavi, ili unuj post aliaj leviĝis al ribelo. Ili atakis lokajn registarojn, mortigis impost- kaj rent-kolektistojn





kaj malfermis grenejojn de bienuloj. La flamo de la kamparana revolucio rapide etendiĝis en la tuta Ŝenhi kaj al aliaj provincoj, kaj estiĝis torento de kamparana insurekcio.

Li Ziĉeng naskiĝis en la jaro 1606 en iu kamparana familio de Miĉi-gubernio en la norda parto de Ŝenhi-provinco. En sia infanaĝo li paŝtis ŝafojn por bienuloj kaj poste fariĝis soldato. Nepovante toleri subpremon de bienuloj kaj oficiroj, li aliĝis al la kamparana armeo gvidata de Gaŭ Jinghiang kaj fariĝis kapabla generalo.

Trupoj de la kamparana armeo vigle batalis en la provincoj Henan, Hubej kaj Ŝenhi kaj serioze minacis la regadon de Ming-dinastio. En la jaro 1635 regantoj de Ming-dinastio mobilizis militan forton de kelkaj provincoj kaj sieĝis la kamparanajn trupojn. Gvidantoj de tiuj trupoj venis al Hingjang por konsiliĝi kiel kontraŭataki la registarajn trupojn. En la kunveno Li Ziĉeng prezentis sian projekton dividi la militfortojn en 4 vojojn en la direktoj suda, okcidenta, norda kaj orienta. La unuaj tri vojoj defendos sin kontraŭ la malamiko, kaj la ĉefaj fortoj estos koncentritaj al la lasta vojo por tie trarompi sieĝon de la malamiko kaj marŝi orienten. La projekto de ofensivo en defensivo kaj de pasivo en iniciativon estis aprobita de ĉiuj. Post la kunveno, la kamparanaj trupoj komencis grandskale akordan militon laŭ la projekto. La ĉefaj fortoj gvidataj de Gaŭ Jinghiang kaj Li Ziĉeng marŝis orienten, de Henan ĝis Anhuj, kaj de Anhuj returne ĝis Ŝenhi kaj per tio la kamparanaj trupoj sin liberigis de la pasiva situacio.

En la jaro 1636 Gaŭ Jinghiang mortis en batalo. Li Ziĉeng estis elektita gvidanto de la kamparana armeo kaj estis nomita Reĝo Li Ĉuang.

Post nelonge la kamparana armeo komandata de Li Ziĉeng atakis Siĉuan-provincon el Ŝenhi. La lokaj kamparanoj unuj post aliaj aliĝis al la armeo. Nur en nelonga tempo ĝi sukcesis okupi pli ol 30 subprovincojn kaj guberniojn. En la jaroj de batalado Li Ziĉeng renkontis ankaŭ malsukcesojn, sed li daŭrigis la batalon.

En la jaro 1640, en Henan kaj aliaj provincoj okazis seriozaj katastrofoj. Por sinsavi la kamparanoj leviĝis al ribelo. Utiligante la favoran ŝancon, la armeo sub la gvido de Li Ziĉeng revenis al Henan. Tie Li elmetis, laŭ opinio de subuloj, sloganon "dividi teron kaj nuligi imposton". Tiu ĉi slogano respondas postulon de la vastaj kamparanoj kaj instigis ilian batalvolon kontraŭ la feŭda regado. Li Ziĉeng difinis ankaŭ armean disciplinon "mortigo de homo egalas al mortigo de mia patro, malĉastigo de virino egalas al malĉastigo de mia patrino". Krome la armeo severe punis la koruptiĝintajn ŝtatoficistojn, lokajn tiranojn kaj fi-grand-sinjorojn en lokoj, kie la armeo venis. Tial la armeo estis subtenata de popolanoj. Kiam ĝi sieĝatakas la urbon Kajfeng de Henan-provinco, kamparanoj sin organizis por ĝin helpi, kaj forĝistoj en la urbo ankaŭ faris armilojn por ĝi. Dank' al tio, la armeo akiris venkon post venko. Printempe de 1642, ĝi okupis la urbon Kajfeng, kaj en la sama jaro ĝi konkeris Hiangjang de Hubej-provinco. Tiam la armeo havis jam milionon da batalantoj kaj fariĝis potenca forto de la kamparana revolucio.

Baraktante por sinsavi, regantoj de Ming-dinastio ankoraŭfoje koncentrigis siajn fortojn kaj lanĉis reatakon al la kamparana armeo. Printempe de 1643, Li Ziĉeng komandis sian armeon norden por decida batalo. En la batalo, estis mortigitaj pli ol 40,000 armeanoj de Ming-dinastio, inkluzive ĝian ĉef-komandanton Sun Ĉuanting. Per tio, la ĉefa forto de Ming-dinastio estis fine ekstermita. En oktobro samjara la kamparana armeo eniris en Hi-an, granda urbo de nordokcidenta Ĉinio. En januaro de la sekvanta jaro Li Ziĉeng fondis kamparanan regpotencon nomatan "Daŝun".


En februaro de 1644, komandante milionon da armeanoj, Li Ziĉeng transpasis la Flavan Riveron kaj Ŝanhi-provincon kaj rekte sin direktis al Pekino, la ĉefurbo de Ming-dinastio. La garnizono de Pekino jam delonge ne volis servi al la feŭdaj regantoj. Ĝi malfermis eksterajn pordojn de la urbo kaj bonvenigis la kamparanan armeon. Imperiestro Ĉongĝeng sin pendigis. La armeo de Li Ziĉeng

eniris en Pekinon en hurao de popolanoj, kaj finis la regadon de Ming-dinastio, kiu daŭris 276 jarojn.

Ĝuste tiam, kiam la revolucia reĝimo fondiĝis, Vu Sanguj, generalo de Ming-dinastio gardanta la pasejon Ŝanhajuan ĉe la orienta fino de la Granda Muro, furioze atakis la kamparanan armeon en komploto kun estroj de Manĉur-nacio ekster la Granda Muro. Enmiksiĝo de Manĉur-nacio akriĝis enlandajn naciajn kontraŭdirojn. Dume pro kamparana malforteco mankis al gvidantoj de la kamparana armeo politika antaŭvido kaj persekutemo al restiĝintaj malamikoj. La suboficiroj siaflanke aspiris plezuron kaj ĝuadon post eniro en Pekinon, kaj perdis pli kaj pli batalspiriton. En la batalo ĉe Ŝanhajuan, la kamparanaj trupoj malvenkis, kaj Vu Sanguj direktis sian armeon rekte al Pekino. Ne povante sin defendi de la atako Li Ziĉeng forlasis kun sia armeo la ĉefurbon en aprilo de la sama jaro, kaj retiriĝis al Ŝanhi-provinco. Fronte al la alianca atakado de regantoj de Manĉur-kaj Han-nacioj, la kamparana armeo povis nur retiriĝi batalante, kaj ĝia batalpovo pli kaj pli malfortiĝis.

En majo de 1645, Li Ziĉeng heroe mortis en batalo ĉe Giugongŝan-monto de Tongŝan-gubernio de Hubej-provinco. Sed liaj subuloj ne subiĝis al la malamiko kaj daŭre batalis kelkajn jarojn.

La kamparana revolucia milito gvidata de Li Ziĉeng serioze batis tiaman feŭdan regantan klason kaj antaŭenpuŝis disvolviĝon de la socia produkta forto. La nomo de Li Ziĉeng kaj heroaĵoj de la kamparana armeo ĝis nun estas laŭdataj de la popolo.



*Papertranĉaĵo*

## trovis sian filon dank' al helpo de Lej Feng

**A**NTAŬ sia morto Lej Feng estis kaporalo de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li estas granda komunisma batalanto. Li tutanime servis al la popolo dum sia tuta vivo. Antaŭ dek jaroj li forpasis. Prezidanto Maŭ Zedong faris sian alvokon: **“Lernu de kamarado Lej Feng”**. De tiam li fariĝis la lernenda modelo de la ĉina popolo kaj ĉie cirkulas rakontoj pri liaj laŭdindaj faroj.

Iufoje, kiam kamarado Lej Feng atendis vagonaron en la stacio de Ŝenjang, li vidis ke maljunulino kun bastono en la mano kaj granda pakaĵo sur la dorso iras malfacile. Li kuris al ŝi kaj demandis: “Kien vi iras, onklino?”

La maljunulino diris spiregante: “Mi venis de sude de la Granda Muro por viziti mian filon en la urbo Fuŝun.”

Aŭdinte ke ŝi iros la saman vojon kiel li, Lej Feng tuj prenis de ŝi la pakaĵon kaj ŝin apogante diris: “Iru, mi konduku vin al Fuŝun.”

La vagonaro estis jam homplena, kiam ili eniris en la vagonon. Lej Feng deziris havigi sidlokon al la maljunulino, kaj iu studento apud ili stariĝis kaj cedis sian sidlokon al la maljunulino. La vagonaro ekmo-

viĝis. Lej Feng prenis el sia sako du panojn kaj donis unu al ŝi. Sed ŝi rifuzis. Lej Feng diris: “Ne estu tro ĝentila, onklino, manĝu!...” kaj enmanigis al ŝi la panon. La maljunulino tiel emociiĝis, ke ŝi ne sciis kion diri.


Manĝante Lej Feng interparolis kun la maljunulino. Ŝi diris: “Mia filo estas laboristo. Li forestis de mi jam kelkajn jarojn kaj mi ne scias kie li loĝas!” Tion dirante ŝi elpoŝigis koverton.

Lej Feng legis la adreson, sed ankaŭ li ne sciis kie estas la loko. “Trankviliĝu, onklino,” diris Lej Feng rigardante la helpopetan mienon de la maljunulino, “certe mi trovos por vi la filon.”

Elvagoniĝinte, Lej Feng deponis sian pakaĵon en la stacio, poste surŝultrigis la pakaĵon de la maljunulino kaj apogante ŝin trairis homamasojn. Li petadis informojn al homoj survoje renkontitaj kaj finfine trovis ŝian filon post preskaŭ duhora piedirado. La unua vorto de la maljunulino je la vido de sia filo estis: “Se ne la knabo kondukus min, mi ja ne scius kiam mi vin trovos.”

Je la adiaŭo de Lej Feng, la maljunulino kaj ŝia filo akompanis lin ĝis malproksime tenante liajn manojn.

Cedi sidlokon



Ilustrita de Ĝang Ŝijong

## Sur la Kovrilo:

Intelekta junulino Ĝaŭ Gjunĝen—  
nun partia sekretario de produk-  
ta brigado de nia fotisto

## Sur la Dorskovrilo:

Hin-an-rivero

Foto de Vang Ĝengbaŭ




# EL POPOLA ĈINIO 人民中国报

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (178) 1973

## Ĉefa Enhavo

Plena Sindediĉo al Konstruado de Nova Kamparo .....	1
Ĉefflegistino Tan Hujlan .....	5
Ekflugi en la Aero .....	9
Estu Kamparanoj! — Konsilo de Prof. Ĝaŭ Hongĝang al Siaj Gefiloj .....	12
Kreo de Novaj Ĉinstilaj Pentraĵoj .....	15
Pligrandigo de Elektro-centralo .....	17
Artefarita Lago apud Hiliaŭ-rivero .....	20
La Konstruo de Domoj de Ŝenjang .....	24
La Ĉina Luktarto .....	27
Amikoj Venas de Malproksime .....	30
Nova Floro de Amikeco kaj Arto .....	34
Guo Moĵuo, Liaŭ Ĉengĝi kaj Hu Juĝi Donis Bankedon en Honoro al Delegacio de Japanaj Kulturaj Rondoĵoj .....	38
Burĝono (novelo) .....	39
Ji-nacio .....	44
Galopanta Ĉevalo el Bronzo .....	47
Reĝo Li Ĉuang .....	48
Maljunulino Trovis Sian Filon dank' al Helpe de Lej Feng .....	51



# Minhang—Industria Kvartalo de Ŝanhajo


Grupo de teknika renovigo de iu fabriko provas krei novan teknologion.




Minhang troviĝas apud Huangpu-rivero je 30 kilometroj sudokcidente de Ŝanhajo. Antaŭe ĝi estis ordinara urbeto, sed nun jam fariĝis industria bazo, kie troviĝas famaj fabrikoj de elektraj maŝinoj, turbinoj, kaldronejoj kaj pezaj maŝinoj.

La vastaj amasoj de tieaj laboristoj kaj oficistoj produktis, peneme luktante en malfaciloj kaj sin apogante sur propraj fortoj, grandan nombron da metalurgiaj, minejaj, forĝaj kaj akvoutiligaj ekipaĵoj kaj pezaj ilmaŝinoj, per kiuj ili forte subtenis la socialisman konstruadon de nia lando.

Fotoj de Ĉeng Kegjun, Ĝou Songliang, Ĝou Ji kaj Feng Pejŝan




Unu el la laborejoj de la Ŝanhaja Fabriko de Kaldronegoj



Laboristino de la Ŝanhaja Fabriko de Pezaj Maŝinoj atente kontrolas la kvaliton de produktaĵo.



Sperta laboristo Gu Hihian prilaboras maŝinparton.



Grandtipaj ilmaŝinoj mem projektitaj de la Ŝanhaja Fabriko de Pezaj Maŝinoj en produktado





Gelaboristoj lernas post la laborhoroj.




Junaj laboristinoj de la Ŝanhaja Fabriko de Elektraĵ Instrumentoj dum laboro



Manĝaĵo-butiko kiu servas  
tage kaj nokte al la gelabo-  
ristoj de Minhang

Al laboro





## Ruĝverta Gruo

Ruĝverta gruo (*Grus chinensis Crane*) estas rara birdo de nia lando. Ĝi vivas en la Nordoriento kaj la marbordaj provincoj en suda Ĉinio, ĉe rivero, lago aŭ en marĉo kaj manĝas fiŝojn, salikokojn kaj insektojn. Ĝia korpo plejparte blanka estas relative granda kaj ĝia kolo tre longa. Ĝi ricevas sian nomon pro la ruĝa tubero sur la frunto. Pro sia svelta korpo kaj sonora bleko, de longe ĝi estas rigardata de nia popolo kiel fea birdo kaj estas nomata ankaŭ per fea gruo. Ĝia vivo longas je 50 ĝis 60 jaroj, tial ĝi estas uzata kiel simbolo de longviveco, kaj servas kiel temo de multaj versaĵoj, kantoj kaj pentraĵoj de la antikva Ĉinio.

5149

